

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Ela Karczewska  
respondas pri la  
Bjalistoka Kongreso  
La Infana Kongreseto  
ILEI kaj NASK jubileis  
OSIEK konferencis en  
hungara kamparo  
Homaranisma simpozio  
Du ampleksaj recenzoj  
Paĝoj el la historio de  
la Sukcena Lando (14)  
Poemoj de Nikolaj  
Jazykov  
István Ertl pri  
“Literatura Mondo”  
Flo pri la festa FESTO



2009

10

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2009. №10 (180)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Peter Baláž, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloisio Sartorato, Serge Sire, Andrzej Sochacki

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2010**

*Internacia tarifo:* 38 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 20 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 590 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldon:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la 23a paĝo.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 600 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (3000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1800 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (1000 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (600 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 15 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2009.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2009, №10 (180).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 14 сентября 2009 г.

Цена свободная. Тираж: 600 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

**M**ia bona konatino urĝe, tuj post la operacio, evakuiĝas el kancerkliniko: tiu estas fermata kadre de ĝenerala reordigo de la medicinaj servoj. Trenante siajn pakojn malsupren de kruta ŝtuparo, ŝi lamentas pri sia malbonŝanco: nova operacio estis fiksita post tri tagoj. Nun neniu scias eĉ pri la morgaŭo. Realista, ŝi ne plendas pri la politiko del personoj, sankciintaj la fermon. Por ŝi la motivo estas klara: al ili plaĉis la loko. La loko vere estas plaĉa: impona germankonstrua domo kun skvaro en la centro de la urbo. Mi kaj ŝi, kaj ili. La distanco sentebblas, kaj ĝi ĉiam pligrandiĝas. La pliaĝuloj filozofie konsideras ĝin abismo, la junaj naivuloj strebas ĝin transsalti. Vana afero. Ili estas malproksime. Kaj ili ne konstruas pontojn, ekz. en la formo de kancerkliniko. Iam en prahistoria soveta epoko, priskribita de Aleksandr Solĵenicin (Eble, vi legis lian *Kanceran domon?*), ili renkontiĝis kun la aliaj en tiuj ejoj de sufero, samkiel, foje, en ejoj de jubilo, laboro kaj amuzo. Hodiaŭ ilia kancerkliniko estas eksterlande, kaj stulte estus meti monon en tiun senprofitan aferon.

Sed koncerne la jubilon (aŭ pli larĝe — la areon de emocioj): elastaj psikologoj, ili metas monon en pli gajnan entreprenon. Ili konstruas grandan kaj firman ponton, kaj tiu ponto nomiĝas: Ni.

— Ni, — diras iliaj specialistoj pri amaslaboro. — Ripetu kune: ni! Kaj vole-nevole, role-nerole la ripetema amaso reproduktas ilian sloganon. La sama amaso neniel sin esprimis, kiam ĝia nafto kaj gaso fakte aparteniĝis al 4–10 familioj. Sed jen tiuj feliĉaj posedantoj ekkverelis kun iuj en Ukrainio, kaj leviĝis la unuiga krio. Ni! Kaj oni pretas militi kontraŭ tiu malafabla Ukrainio, tute fizike kaj samtempe plej platonice, ĉar ne por si, sed por siaj ofendistoj.

Gasa magnato pagas per ŝtelita mono ludistojn kaj trejnistojn el la tuta mondo, ruinigante preterpase, sed ĝisfunde ruslandajn regionojn kaj subfosante la bazon del nacia sporto, sed li pagas ankaŭ karesan iluzion, kiun oni nomas venko, kaj ni leviĝas ekstaze en fantoma komuneco kaj krias: ni. “Ni” estas perfekta masko. Ni — ŝtelistoj kaj priŝtelitoj, boaoj kaj kunikloj, puloj kaj pugoj — pitoreska maskobalo: trinku bieron kaj krii kune “all together now”, kaj vi estos bonaj patriotoj, preskaŭ fratoj al viaj samlandanoj en Londono, Davoso kaj Filadelfio.

Tia estas nia nova rusa patriotismo, iom bizara por nekutima rigardo, iom virtuala en la senco de la senco, sed ja vera ponto super la vera fendaĵo.

**Alen Kris**

**Sur la kovrilpaĝo** estas aŭtuna foto de Vladimir Merkulov, kiu ricevis la duan premion en nia pasint-jara Fotokonkurso. Ĝi ja memorigas al ni pri aŭtuno, kiu nun oras en Eŭropo. Ankaŭ pri la 12a Fotokonkurso jam anoncita (vidu la dorspaĝon). Ankaŭ pri Lev Tolstoj, en kies bieno Jasnaja Poljana estis farita la foto — sekvajare ni ofte rememoros pri Tolstoj okaze de la centa datreveno de lia forpaso.





# La 94a UK: Dolĉa estas la sukceso

## Elżbieta Karczewska respondas

Malgraŭ la granda okupateco, la vicprezidanto de la Loka Kongresa Komitato (LKK) kaj la ĉefa motoro de la 94a Universala Kongreso de Esperanto, Elżbieta Karczewska, afable konsentis respondi kelkajn demandojn de *La Ondo* pri la kongreso, kiun multaj taksis la plej sukcesa UK en ĉi tiu jarcento.

### Ĉu vi atendis tiom da laboro, kiam vi engaĝiĝis en la laboro de LKK?

Mi estas entuziasmulino, kaj mi ĉiam laboras same forte. Se mia laboro interesas min, mi ne ŝparas la tempon eĉ posttagmeze kaj nokte; se ĝi enuigas min, mi ŝanĝas la laborpostenon. Trifoje en mia vivo mi ŝanĝis la postenojn: ĉiam pro dubo, ĉu mi plu ŝatas mian laboron. Se temas pri LKK, mi ne havis elekton. Iun tagon post la Jokohama UK oni informis min, oficistino de la urbodomo, ke por mi estas kreita nova posteno — prokuristino de la urbestro pri la 94a UK. Pli frue mi laboris en la departemento de medioprotektado. Do, mi simple ŝanĝis la ĉambron kaj daŭre laboris.

### Kiujn ĉefajn problemojn frontis LKK?

La plej gravaj el ili estas homaj emocioj kaj ambicioj. Kiam bjalistokaj aktivuloj renkontiĝis unuafoje, ili ĉefe diskutis pri la konsisto de LKK. Ĉu pli valoras por la organizado loka krokodilo plena de bona volo kaj povo, aŭ konata pola esperantisto vivanta malproksime? Kiu devas esti la prezidanto? Volontuloj estas homoj, kiuj “povas” sed neniam “devas”. Iujn ŝokis, ke kiel la prezidanto de LKK en Bjalistoko estis elektita neesperantisto. Dum la formiĝo de LKK oni ne diskutis ĝian rolon, ĉar tiam neniu estis certa, kiuj taskoj apartenos ĝuste al LKK. Ni logike devus aranĝi ĉion eblan surloke, ĉar ni estas lokaj “spertuloj”. Nur tri personoj partoprenis antaŭe almenaŭ unu UKon kaj ili devis komenci la diskuton, kion LKK devas ripeti kaj kion ŝanĝi en Bjalistoko.

### Kiujn impresojn vi havas pri la preparo kaj okazigo de la kongreso?

Ĉiutage mi lernis ion novan. Mia urbestro subtenis finance aŭ morale diversajn ideojn, sed komence iu devis pripensi ilin. Pro manko de sperto ni agis intuicie. Komprenoble ekzistis kongresa operaciario, sed ĝi en multaj punktoj evidentiĝis tro teoria aŭ eĉ ne plu valida. Ofte ni sentis sin senfortaj. Ekzemple, artistoj, kiuj proponis siajn spektaklojn, ne kredis, ke ni longe ne povis paroli pri mono, ĉar la kongresa buĝeto iĝis konata nur en aprilo 2009. Danke al la pli frua partopreno en diversaj konkursoj LKK

povis trioble pligrandigi la sumon, buĝetitan de UEA por la arta programo. Multaj samideanoj proponis siajn proprajn projektojn. Ne ĉiuj estis akcepteblaj por LKK, sed homoj insistis serĉante subtenon ĉe “altaj instancoj”. Ĝenerale, la esperantistoj ne scias, kiel UEA dividas taskojn. Okazis longa, malagrabra por LKK, diskuto pri prezoj de servoj. Ni decidis ne engaĝi nin publike, kaj kelkaj traktis tion ne kiel prudenton, sed kiel malfortecon. Konata samideano publike nomis nin “kolektantoj de terpomoj, ne organizantoj”. Post la UK evidentiĝis, ke tamen organizantoj...

Kiam io negativa okazas, unue mi havas impreson, ke mia mondo rompiĝas, kaj mi ne estas sufiĉe forta virino. Ege plaĉis al mi la diraĵo de KKS: “Ni ne serĉu kulpanton, ni serĉu solvon”.

### Kio, laŭ vi, estas la ĉefa rezulto de la kongreso?

La situo de la naskiĝurbo de Zamenhof ne estas favora por turistoj. Por logi ilin ni serĉas ion unikan, kion ne havas la mondo. Ĝuste la esperantista mondkongreso estis speciala oferto por specialaj gastoj. Ili venis, vidis, venkis siajn dubojn, kaj nun ili iĝis niaj heroldoj. La mondo ekaŭdas, kiel bela estas Bjalistoko kaj ke valoras reveni tien kun familianoj kaj geamikoj. Iu skribis al mi rete, ke la kongreso devas daŭri du semajnojn. Mi estas certa, ke temis ne pri kongresaj prelegoj, sed pri manko de tempo por admiri la urbon, sidi trankvile en loka restoracieto kaj gustumi lokajn specialaĵojn, viziti lokajn vendejojn kaj kompari prezojn. Svisa kolego Andy K. demandis, ĉu la urbestro vere ŝatas Esperanton. Laŭ mia opinio, li estas simple bona estro kaj subtenas ĉiun pozitivan agadon por la disvolviĝo de la urbo. Saĝa urba politiko ne dependas de la amo de la urbestro sed de lia saĝo.

### La 2an de aŭgusto por la ordinara kongresano la 94a UK estis jam historia fakto, sed eble ne por LKK?..

Reiris hejmen la aliurbaj membroj de LKK. La 3an de aŭgusto LKK-ano Roberto skribis: “post dusemajna taga kaj nokta kongresa laboro mi ne povas reveni al la prozo de vivo. Mi volonte revenus Bjalistokon!”



Sekvis postkongresaj ekskursoj, postkongreso en Malborko kaj poste familioj rericivis siajn patrojn kaj patrinojn por libertempoj komune. Jam iomete libertempis ĉiuj krom mi. Unupersono mi respondecis pri la havaĵo de la tuta Politekniko, kiu restis je la dispono de la kongreso. Kun tremo de l' koro mi kontrolis kun administra komisiito ĉiujn ĉambrojn, koridorojn por noti eventualajn mankojn aŭ detruojn. Danke al Dio, ĉio estis en ordo, nur la verdaj onoj oni devas renovigi. Venis pagataj realigantoj de la programo por ricevi monon. Estus afable danki al ĉiuj, kiuj propravole, senpage, diversmaniere helpis aranĝi, subtenis finance. Venis petleteroj de tiuj, kiuj dum la kongreso perdis jakojn, ombrelojn, fotilojn, okulvitrojn...

En Bjalistoko restis por kelkaj tagoj pro diversaj kialoj kelkaj eksterlandaj samideanoj. Feliĉe lokaj esperantistoj havis ankoraŭ tempon por ili.

Irante la renkontiĝon ĉe la Politekniko mi hazarde renkontis junan volontulinon, kiu biciklis tra lerneja verdaĵo. Ŝi diris, ke ŝi faras “romantikan vojaĝon en la pasinteco, pensante: UK — revenu!”

Post la kongreso venis ankoraŭ el eksterlando pakoj kun libroj senditaj sen la interkonsento kun la organizantoj al la libroservo kaj malĝuste adresitaj. Aliaj ĝustatempe sendis librojn por vendado sed ili “naive” trotaksis la eblecon de vendado — eĉ dum la kongreso en la libroservo oni ne vendas centojn de la samaj titoloj.

### La kongreso estis la ĉefa ĉi-jara evento en Esperantujo. Ĉu la esperantistaj amaskomunikiloj adekvate informadis pri la kongreso?

Ne estas facile varbi al la kongreso. Antaŭ unu jaro, en Roterdamo kelkaj diris: “mi jam estis tie, venos la samaj homoj, kantos la samaj kantistoj...”

Kiu ĵurnalisto povus antaŭvidi, kio okazis en Bjalistoko? Jes, ekzistas iu rutina kongresa skemo, kiun ni sekvis, sed la ŝanĝoj estas eblaj, bonvenaj kaj eĉ necesaj en neatenditaj momentoj.

Dum la kongreso okazas la programo, sed ankaŭ kelkaj incidentoj. Bedaŭrinde, niaj retaj amaskomunikiloj ofte raportis ne pri gravaj, longe atenditaj pozitivaj aferoj, sed pri stultaĵoj faritaj de junularo. Oni tuj difinis ilin “anti-semitismo” kaj “atakoj de vandaloj”, ktp. Finfine, policistoj kaptis 16-jaran knabon, kiu ĵetis glason da farbo al la monumento de Zamenhof. Ni planas iri lian lernejon por demandi lin publike: kio vekis lian agreson? Ĉu li vere sentas malamon al Zamenhof? Kontraŭ kio li tiamaniere protestas? Al policistoj li diris, ke li ne scias la kaŭzon de sia faro. Kiam li faris tion, li ne estis plenkreska.

Kelkaj gastoj aŭdis pri tiuj incidentoj nur post sia reveno hejmen. Ili miris, ĉar surloke ili ĝuis nur la kongresan etoson.

### **Kaj la lokaj kaj pollandaj gazetoj, radioj kaj televidoj?..**

Dum en- kaj eksterlandaj aranĝoj, kiam prezentis sin Bjalistoko, oni ĉiam subtekris gravan rolon de Esperanto en la pasinteco kaj por la estonteco.

Mi kelkfoje akre diskutis kun lokaj ĵurnalistoj, kiuj opiniis, ke la urbestro en Bjalistoko ne sufiĉe vaste reklamas la 94an UKon. Mi opiniis, ke ne estas rolo de la urbestro varbi kongresanojn. Bjalistokanoj devis strebi por bone prezenti sian urbon al gastoj. La organizantoj edukis urbanojn pri Esperanto, rakontis pri la pasintaj UKoj, donis ŝancon partopreni parteton de la kongreso. Tio okazis danke al loka gazetaro kaj aliaj amaskomunikiloj, kiuj informis pri la progreso de preparoj. Nun dependas de homoj:

se al ili plaĉis tio, kion ili vidis dum nia UK, bjalistokanoj komencos lerni Esperanton kaj eble venos post unu jaro al Kopenhago. Multaj lokaj volontuloj jam deklaris, ekzemple, ke ili partoprenos venontjare la 77an Italian kongreson.

Laŭ mia frato ĉiutage oni povis spekti ion en la televido pri la 94a UK. Certe en Bjalistoko oni sufiĉe multe montris, skribis kaj rakontis... Kaj en Pollando ĝenerale? Mia ĉefino ripozis en montaro kaj tie ŝi, spektante tutlandan televidon, vidis raporton pri la kongreso. Poste ĉe Mazuraj Lagoj ŝi legis ĉiutage ion en gazetaro. Miaj familianoj el diversaj urboj post la legado/spektado de informoj pri UK telefonis plurfoje al mi, sed mi neniam povis paroli kun ili, ĉar mia kongresa labortago komenciĝis je la sesa matene kaj finiĝis post la noktomezo.

### **Kaj la ordinara kongresanoj... Kiajn opiniojn ili havas?**

Nia novaĵo estis *Libro de plendoj kaj deziroj*. Ĝi estis en la akceptejo je dispono de ĉiuj. Imagu, ke ĉiuj enskriboj estis nur pozitivaj. Neniu malkontenta skribis al ni letere. Pro sia konstrua kritiko konata estas la germanino Nora C., sed ankaŭ ŝi ĉi-foje kaptis mian koron nur gratulante.

Aliaj germanoj retumis: “Nun mi jam estas kelkajn tagojn hejme, kaj pli kaj pli la kutima vivo denove plenumas miajn tagojn, sed la bela UK, bonege organizita, daŭras en mia kapo. Mi jam al vi diris en Bjalistoko, ke vi admirinde organizis kaj realigis ĉion. Gratulon por via plena sukceso! Klaus kaj mi en la aviadilo lasis preterpasi la tutan kongreson mense, kaj ankaŭ Klaus estis plena de laŭdo por via organizado”.

Bruĉjo C. el Italio skribis “Denove dankon por la plej bela el miaj 22 UKoj”.

Kiu partoprenis 22 UK-ojn estas por mi aŭtoritato. Liaj laŭdoj estas ege valoraj.

La konsilanto de la Slovaka ambasado en Bruselo Jan Reinart organizis kun la Pollanda Ambasadejo kaj belgaj esperantistoj la 8an de septembro kunvenon omaĝe al la 94a UK kaj al la 150a naskiĝdatreveno de Zamenhof. Similan aranĝon organizas la 18an de septembro Munkena Esperanto-Klubo kun la Pollanda Kulturcentro kaj Pollanda konsulejo en Munkeno. Ili ricevis de ni multe da materialo pri Bjalistoko, Podlahio kaj ĝenerale pri Pollando. Ĉiuj petletoj de organizantoj de eventoj enhavis informojn, ke ili dezirus diskonigi siajn bonajn impresojn el Bjalistoko.

### **La 94a UK havis pli grandan subtenon de la urbaj instancoj ol kutime. Ĉu Esperanto estas plu subtenota en la naskiĝurbo de Zamenhof?**

Bjalistoko subtenas Esperanton diversmaniere. Kiel oficistino de la urbodomo mi klopodas enkonduki en la venontjaran komunuman buĝeton monon por la Esperanta televido kaj por esperantologia konferenco. Bjalistoka Esperanto-Societo ĉiujare partoprenas urban konkurson, danke al kiu ni ricevas komunuman monon por subteni niajn aranĝojn. Kun plezuro mi observas la novan Zamenhof-Centron. Malrapide sed decideme ili enkondukas novajn formojn de laboro, novajn temojn inter kiuj brilas Esperanto. Przemek Wierzbowski komencis instrui Esperanton al ĉiuj laborantaj en la Centro. En oktobro oni komencos Esperanto-staĝon por junularo. Paŝon post paŝo...

### **Kiujn interesajn eventojn en la urbo vi povas rekomendi al niaj legantoj?**

Venu al ni la 11an de decembro por partopreni niajn 10ajn Bjalistokajn Zamenhof-Tagojn. Ĉi-jare ili daŭros kvin tagojn. Legu la programon en: [www.espero.bialystok.pl](http://www.espero.bialystok.pl). La aranĝo estos familia: tio signifas, ke ni ne postulas aliĝkotizon sed volonte helpas trovi loĝlokon por ĉiuj.

### **La lasta demando, iom fantazia. Se tempomaŝino portus vin al la jaro 2007, ĉu vi denove enjungus vin inter la tirĉevalojn de la kongresa ĉaro?**

Tiuj, kiuj jam travivis ion similan, scias, kiel dolĉa estas la sukceso. Jes, mi volonte organizus ankoraŭfoje UKon en Bjalistoko. Mia urbestro invitis ĉiujn post dek jaroj!



**Sur la foto.** Malgraŭ la densa programo, la kongresanoj en Bjalistoko ne nur kongresumadis (*Fotis Andrzej Sochacki*)



## ILEI jubileis en Krakovo

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), fondita en 1949, festis la 60-jariĝon dum sia 42a Konferenco en Krakovo (Pollando). Ĝi okazis 17–25 jul en la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo kun ĉ. 80 partoprenantoj el trideko da landoj.

En la komitatkunsido de ILEI okazis elekto de nova estraro. Kiel la prezidanto estas elektita Stefan MacGill el Nov-Zelando/Hungario, vic-prezidanto fariĝis Duncan Charters el Britio/Usono, sekretario Małgosia Komarnicka el Pollando/Germanio. Aliaj estraranoj estas Julija Batrakova el Ruslando/Nederlando (financo), Zsófia Kóródy el Hungario/Germanio (ekzamenoj, Esperanto-centroj, instrukapablilo; ekzamena komisiono), Radojica Petrović el Serbio (edukaj projektoj kaj informa agado), Julián Hernandez el Kubo (lerneja kaj landa agado; komisiono pri lerneja agado). Estis aprobita la buĝeto por 2010 kaj celaro por 2009–2012, kiu formas la bazon por la trijara agadplano.

La nova prezidanto Stefan MacGill skizis manierojn laŭ kiuj oni povas plue aktivi en la Ligo tra la jaro:

— Vizitadu hejmpaĝojn: de ILEI, de edukado.net, de lernu.net, sekciajn paĝojn. Lasu komentojn, prijuĝu lernilojn; kontribuu al debatoj en diskutlistoj.

— Partoprenu sekciajn aranĝojn, por ke tiuj havu internacian karakteron kaj la uzo de Esperanto estu necesa kaj valora. Partoprenu aliajn aranĝojn kaj tie konigu la laboron de ILEI — ĉu per prelego, budo aŭ okazigo de kurso aŭ alia aranĝo.

— Dissendu ILEI-komunikojn, por ke ili atingu tiujn Esperanto-instruistojn, kiuj ne membras en ILEI. Kiam la enhavo estas konvena, traduku la komunikon kaj dissendu ĝin al via loka provinca aŭ landa gazetaro.

— Aliĝu al la 43a ILEI-Konferenco, kiu okazos en Kubo unu semajnon antaŭ la sekvontjara UK.

La sesan tagon de la konferenco (23 jul) okazis unu el la ĉefaj punktoj de la konferenca programo — la simpozio. Kadre de la simpozio, kunorganizita de ILEI kaj kvin polaj universitatoj kaj altlernejoj, esperantistaj kaj neesperantistaj scienculoj prelegis pri demandoj ligitaj rekte aŭ malpli rekte al la konferenca temo: “La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado”.



Krakovo: La rektoro de la Supera Lernejo, gastiginta la Konferencan de ILEI, Włodzimierz Roszczynialski, kun la aŭtorino de ĉi tiu artikolo.

Estis prezentitaj entute 18 prelegoj pri edukspertoj kaj tendencoj en la edukstemo de Pollando kaj edukagado en Esperantujo, lernfaciligaj efikoj de Esperanto kaj aliaj lingvoj lernitaj kiel la unua post la gepatra, ekzisto kaj konsisto de Esperanta kulturo, praktikaj kaj teoriaj aspektoj de interkultura komunikado kaj lingvoinstruado, instruado de universalaj etikaj valoroj, Esperanto en la lingvopolitika kunteksto de EU kaj de Kaŭkaza regiono, Esperanto kiel interlingva perilo de literaturaj verkoj ktp.

La simpozio finiĝis per vigla paneldiskuto, kiu tuŝis ne nur la konferencan temon sed ankaŭ eblajn solvojn por laŭeble plej efika kontribuo de Esperanto al konstruado de paca ponto inter la popoloj

Dum la konferenco okazis studadesio de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj), kiu ebligis al la du organizaĵoj viglan interŝanĝon de spertoj.

En la varia kaj abunda programo estis ankaŭ eblo lerneti la polan lingvon, ekkoni sekretojn de poezia arto kaj kuraĝi elprovi sian plumon kaj vespere ĝui kulturan kaj distran programon en internacia etoso kaj en akompano de ŝatataj kantistoj.

La ekskursiva programo estis ankaŭ bunta kaj ebligis vizitadon de multaj unikaj turismaj allogaĵoj, belaj vidindaĵoj kaj interesaj, historiaj kaj fascinaj lokoj: Kraków, Niepołomice, Wieliczka, Zakopane, Oświęcim (Auschwitz-Birkenau), Wadowice, Kalwaria Zębrydowska.

La fermo de la konferenco estis kortuŝa kaj enhavis ne nur kutimajn dancojn kaj donacetojn sed ankaŭ novan ideon: La pollanda ILEI-sekcio donacis al ĉiu plentempa konferencano belan certigilon pri la partopreno, aŭtentigitan per vaksa sigelo kun emblemoj de la konferenco kaj de ILEI.

**Małgosia J. Komarnicka**

## NASK festis sian 40-jariĝon

Ĉi-jare la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) okazis la trian fojon ĉe la Universitato de Kalifornio en San Diego (UCSD) de la 29a de junio ĝis 17a de julio.

Du Esperanto-aŭtoroj estis parto de la instruteamo ĉi-jare: Spomenka Štimec el Kroatio (ŝia lasta romano estas *Hodler en Mostar*) konatigis la superajn kursanojn kun “La Islama literaturo kaj Esperanto”, kaj d-ro David Jordan el Kalifornio (konata per *Rakontoj Prapatraj pri nia lando antaŭ multaj jarcentoj kiam okazemis aferoj mirindaj*) sorĉis la progresintajn studentojn per la prahistorio de Esperanto inter multaj aliaj temoj.

Lee Miller el Misurio aparte helpis la postbazajn studentojn plifortigi sian konon de la lingvo. La tridek studentoj reprezentis 9 landojn (Usono, Germanujo, Aŭstrujo, Israelo, Belgujo, Malio, Italujo, Kanado, Hispanujo) kaj tri kontinentojn. Tio aldonis la internaciecon al la etoso kaj provizis multajn temojn por interbabilado.

La estraranoj de Esperantic Studies Foundation (ESF) alvenis la duan semajnfinojn por sia jarkunsido samloke kiel la studentoj. Ili aldonis al la 40-jariĝa festo simpozion de gastparolantoj (Humphrey Tonkin, Mark Fettes, David Jordan kaj Spomenka Štimec) kaj oficialan festakcepton por la studentoj kaj la publiko. Duncan Charters gvidis la programon dum la akcepto, en kiu la historio de NASK estis prezentita per fotoj de la pasinteco kaj Dori Vallon-Wheeler (Usona poetino) estis honorita kiel la plej ofta partoprenanto.

Hoss Firooznia, la helpinstruisto, gvidis diversajn eventojn posttagmeze kaj vespere. Ĉi-jare lastminuta propono de lokano Mar Cardenas permesis, ke kelkaj studentoj havis la okazon fari mallongan viziton al Meksiko. Hoss estis ankaŭ la redaktoro de la tagjurnalo *La NASKA Fasko*, kaj li plibonigis la retejon: <http://esperanto.org/nask/> kie troviĝas multaj informoj pri la ĉi-jara kursaro kaj baldaŭ planoj por 2010. Espereble, venont-jare aliĝos tiuj, kiuj volos plifortigi sian Esperanto-kapablon antaŭ ol iri al la mondkongreso en Havano!

La estro de NASK estas Grant Goodall, direktoro de la lingva fako ĉe UCSD. Li prizorgas la universitatajn aferojn, kaj Ellen M. Eddy prizorgas la aliĝon kaj stipendiojn.

**Ellen Eddy**

## OSIEK en Hungario

Pasintjare Paŭlo Kozsuch iom hezitis proponi sian vilaĝon por IEK 2009: konferenco en vilaĝo! En varmega lando! Meze de senreliefa ebenaĵo! Kia defio! Jes ja, la konferenco de OSIEK okazis ĉi-jare en Kondoros, en la hungara stepo, la “Puszta”. Kaj homoj venis, 65 el 11 landoj, kaj ne bedaŭris: “konferenco tiom ĝuinda, tiom ĝuita”, — retumis poste David Kelso el Skotlando; “mirinda semajno en Kondoros”, — skribis al ni Ĵak Le Puil, la redaktoro de *La KancerKliniko*.

Celo de IEK estas triobla: prelega programo pri temo elektita de OSIEK-anoj; konatiĝo kun la regiono de IEK, ĝia kulturo, historio, civilizacio; atribuo de OSIEK-premio.

Paŭlo Kozsuch admirinde enkondukis nin en la vivon de tiu angulo de la mondo per brila malferma prelego kaj ĉiutagaj surprizaj programoj. Multaj el ni loĝis en privataj domoj kaj spertis kamparanan etoson kaj la ŝirmon de adobmuroj kontraŭ la varmo.

La konferenceto estis muzea dujarcenta rendevuejo de “betjar”-oj (eksterleĝuloj, banditoj); rajdisto “betjar”-e vestita mirigis nin per sia arto dresi ĉevalon; kaleŝoj promenigis nin sur polvaj vojoj tra la vilaĝo kaj la kamparo kaj ĝis la ateliero de lignoskulptisto.

Ni ĝuis la kuracbanejojn, abundajn en la hungara stepo. Ni gustumis tradiciajn manĝaĵojn: viandosupon en panbovlo ĉe l’ interkona vespero, fiŝosupon ĉe proksima vilaĝestro, kaj ĉe Edgar de Zilah, en alia vilaĝo, la faman “pörkölt”-on de la Puszta, servitan en terakotaj bovloj speciale faritaj de potisto el proksima urbeto.

En tiu lando de muziko ne mankis cigana violonisto la unuan tagon, klasika violonisto la 2an, flutisto dum brandogustumado la 4an, citromuzikistoj la 6an. Sed plej emocia kaj sakrala estis la koncerto de Franz-Georg kaj Rita Rössler en la preĝejo de Kondoros, kun partopreno de kantistoj de Kondoros. Tre atendita kaj aplaŭdita estis ankaŭ la recitalo de Ĵak Le Puil la 5an tagon.

Ĵak Le Puil, Franz-Georg kaj Rita Rössler brilis en la arta programo, sed precipe ili venis por prelegi kaj instigi debatojn pri la ĉi-jara temo de IEK: “Humuro en la esperanta literaturo”.

Samcele ankaŭ venis Pol Denis, Josef Dörr, David Kelso, László Tóth. David Kelso (“Humuro en planlingvo”) enkondukis la temon laŭ filozofia kaj



En Kondoros oni povas vidi (kaj foti) eĉ “betjaron”. (MdZ)

sociologia vidpunkto. Tri prelegoj prezentis al ni la humuron ĉe Julio Baghy kaj Jean Forge (L. Tóth), Louis Beaucaire kaj Lorjak (Ĵ. Le Puil), Schwartz (J. Dörr). La paro Rössler, duope, cite, muzike, kante, traktis la demandon: “Rikardo Ŝulco — humoristo?!”. Ĵak Le Puil skizis panoramon de *La KancerKliniko*, de la fondo ĝis la nuno de la revuo. Pol Denis, per bela voĉo, fermis la temon per bukado de fragmentoj el verkoj de Raymond Schwartz, post kio ni aŭdis la voĉon de Schwartz mem, trovitan en la reto. Normala IEK entenas sep pritemajn prelegojn kaj unu eksterteman: “Tradukado: arto aŭ tekniko?” estis la oka, far la tradukistoj de *Vojaĝo ĝis noktofino* (OSIEK-premio 2007). Neniam oni tiom ridis dum prelegaj matenoj de IEK. Ĉiuj libroj de Raymond Schwartz en la libroservo — ĉiuj brokantaj — vendiĝis; ĉiuj prelegoj, debatoj, koncertoj estas aĉeteblaj DVD-formate (ĉe *La Gazeto*, gazeto@aol.com).

Post tiom densaj tagoj alvenis la lasta, la 24a de julio, tiu de la ĝenerala asembleo, ĉiu rajtas partopreni, nur OSIEK-ano rajtas voĉdoni; la voĉdondadoj estas sekretaj, escepte pri financaj aferoj. Jen la rezultoj:

— la valoro de OSIEK-premio de nun estas 700 eŭroj;

— Spomenka Ŝtimec ricevis la OSIEK-premion 2009 por “Kroata milita noktlibro”;

— IEK 2010 okazos en Herzberg, Germanio, en julio; la temo estos “Kial Esperanto estas revolucia lingvo?”;

— IEK 2011 okazos en Wuhan, Ĉinio, en aprilo; la temo estos “Ĉina saĝo”. Notindas ke Peng Zhengming venis persone el Ĉinio por prezenti la inviton.

Endas ankaŭ danki la organizanton, Paŭlo Kozsuch, pro du brilaj rezultoj: vigla teamo da helpantoj, esperantistoj,

kiun li kreis en sia vilaĝo; aparta programo por infanoj, sub gvido de Viŝnja Branković kaj junaj virinoj el Kondoros.

Kiam ni demandis al la plej juna konferencano, Sébastien de Zilah, kion li preferis dum la tuta semajno, senhezite li respondis: “la banejoj”, kaj due: “la Esperanto-kursoj kun Viŝnja”. Junaj generacioj — infanoj kun siaj gepatroj, studentoj — ĉeestis en Kondoros, jen espero de plua vivo por nia verda komunumo.

**Madeleine de Zilah**

## Ora nupto

En la tria etapo de la Somera Esperanto-Tendaro en Lančov okazis eksterordinara evento, la ora nupto de geedzoj Novobilský, kiuj antaŭ 50 jaroj konatiĝis per Esperanto kaj intimiĝis en SET. La surprizon preparis iliaj du filinoj, kiuj per aŭto ilin transportis al sekreta loko. S-ino Věra Novobilská estas filino de la fama tradukisto Jiří Kořínek (1906–1988), prof. Vlastimil Novobilský verkis plurajn tekstojn pri literaturo en Esperanto kaj ankaŭ matenan kaj vesperan kantojn, kiujn oni kantas en la tendaro ĝis nun. Komune ili ofte deklamas poemojn.



El Lančov venis pastro, kiu efektiviĝis ceremonion de “geedziĝo” eĉ kun fingroringoj ornamitaj per nombro 50.

Semajnfine venis eksaj tendaranoj por sia tradicia renkontiĝo, ili gratulis al la jubileuloj. La renkontiĝon de la eksaj tendaranoj partoprenis ankaŭ gasto el Svislando Roman Kocián kun la edzino kaj Stano Marček kun siaj edzino kaj filino el Slovakio.

Ĉi-jare estis la plej forta la unua etapo, preskaŭ sepdek personoj, en la dua je dudek malpli kaj en la tria nur ĉirkaŭ dudek. La duan semajnon de la tria etapo fortigis grupo el Brno kaj la jam menciitaj jubileuloj kaj eksaj tendaranoj.

**Miroslav Malovec**



## Esperanto venkis en Montekasino

Montekasino kaj Kasino praktike estas la sama afero. Kasino estas la urbeto piede de la monto Montekasino, sur kiu estas la konata monaĥejo. La nomo Montekasino estas pli konata eksterlande pro la granda batalo dum la dua mondmilito.

Kiam oni decidis kongresi en Kasino, la duboj pri la saĝeco de la elekto estis multaj. Tie ne estas esperantistoj. Ĝi estas sude de la kutima itala pli densa Esperantujo, ĉar ĝi estas sude de Romo. Ktp. Tamen la kongreso bone sukcesis, malgraŭ la antaŭvidoj.

Jen kelkaj ĝiaj ĉefaj trajtoj:

— La manko de esperantistoj en Kasino mem estis kompensata de esperantistoj loĝantaj en vilaĝoj en la ĉirkaŭa teritorio, kiuj formis malgrandan sed aktivan LKK-on. Ĉar en Kasino Esperanto estis io tute nova, per afiŝoj dismetitaj tra la urbo oni sukcesis igi homojn interesiĝi kaj proksimume deko da urbanoj venis por partopreni la unuagradan kurson, kiu okazis dum la kongreso. Oni ankaŭ havis la eblecon prezenti Esperanton al la lokaj instancoj kaj al la publiko per ekspozicio en la urba biblioteko, kie ankaŭ okazis prelegoj en la itala kun traduko al Esperanto. Kurso pri Esperanto dum la vintro en tiu biblioteko estas certa. En neniu alia itala kongreso la lokaj ĵurnalaj tiom multe parolis pri Esperanto.

— La aliĝantoj al la kongreso en la fino estis same multnombraj kiel en aliaj italaj kongresoj kaj oni vidis iom pli da suditalaj esperantistoj.

— La kongreso estis eksperimenta el la vidpunkto de la programo. Oni kunmetis en sabato kaj dimanĉo ĉiujn movadajn erojn (Asembleo de la Federacio, voĉdonado por la nova estraro, kunvenoj de instruistoj, de fakaj asocioj, de lokaj Esperanto-grupoj, ktp.) por permesi al la homoj, kiuj nur povas resti dum la semajnfino, partopreni la esencajn esperantismajn labor-erojn. La ceteraj tagoj (lundo, mardo, merkredo kaj ĵaŭdo) restis liberaj por kursoj, kulturaj programoj kaj ekskursoj. La eksperimento, laŭ multaj, sukcesis.

— La kursoj estis por komencantoj kaj por progresantoj. Tiu por progresantoj kiel jam pasintjare estis tre populŝatata. Esperantistoj ja volas plibonigi siajn lingvosciojn. La tiel nomataj seminarioj estis pri Esperanto en televido, gvidata de Roman Dobrzyński kaj pri Esperanto-kulturo sen libroj, gvidata de

Ĵak Le Puil. Dum ili oni aŭskultis multajn kantojn kaj spektis kelkajn filmojn, interalie la filmon *Sinjoro Tadeo*.

— Sufiĉe interese Itala Esperanto-Junularo aranĝis tie sian seminarion en la kadro de seminarioj de TEJO. Tio estas aparte ĝojiga, ĉar ĝi montras la progreson de la re-kun-kongres-ado de italaj junaj kaj maljunaj esperantistoj.

— La vesperaj spektakloj inkluzivis la konatajn kantistojn, Ĵak Le Puil kaj Gianfranko Molle kaj lokan neesperantistan grupon, kiu prezentis la tipajn lokajn kantojn kun akompano ankaŭ de bek-fluto. Oni ankaŭ projekciis la filmon el la teatraĵo *Doktoro Esperanto* de la aktoro Migliucci.

— Kompreneble estis ankaŭ la solenaj momentoj. Inter ili apartaj estis la inaŭgura parolado de Roman Dobrzyński kaj lia prelego pri Mickiewicz kaj pri la frazoj en la pola himno, kiu aludas al la polaj legioj, kiuj devus marŝi de Italujo al Pollando. Sed la stelo de la semajno estis la aŭstra esperantisto Martin Stuppniĝ, kiu, kiam li estis 18-jara, partoprenis la batalon en Montekasino kiel germana soldato. Li estis savita de pola soldato, ĉar ili decidis ne pafi unu al la alia. Martin pilgrimis al la kaverno en la monto en kiu li restis kaŝita dum la bombado de la monto kaj estis tre varme akceptita de la lokaj instancoj. La vizito al la pola tombejo en Montekasino estis des pli emociiga.

— Ekskursoj portis la kongresanojn al la monaĥejo en Montekasino kaj dum unu tuta tago al Kaserta (Caserta), kie estis la itala somera reĝdomo de la reĝo de Napolo.

Entute temis pri tre bona kongreso.



La celo de Itala Esperanto-Federacio estigi Esperanto-grupojn en la kongresurboj ankaŭ ĉi-foje sukcesis. Temas pri la Esperanto-grupo *Tri steloj*, kiu kolektas la esperantistojn ĉirkaŭ Kasino.

Renato Corsetti

## Feliĉaj infanoj, fieraj gvidantoj

Plene sukcesis la ĉi-jara Internacia Infana Kongreseto kun dek kompetentaj gvidantoj kaj 37 infanoj de 6-jara ĝis junuloj 17-jaraj. Ĉeestis preskaŭ 50 IIK-anoj, t.e. 2% el la UK-anoj. Tiuj 2% aperis en la solena fermo sur la scenejo, teatrumis kaj laŭte kantis. Tiumomente sur la scenejo niaj etaj “estontaj” UEA-estraranoj kovris kelkajn estintajn IIK-anojn el la vico de griza eminentularo.

Laŭta kantado dum la fermo eblis, ĉar la IIK-anoj kantadis ĉiuvespere dum kvaronhoro. Teatraĵon laŭ la pola poemo *La haro* preparis Alina, instruistino el Varsovia teatrolernejo. Artismajn manojn bezonis ĉiuj infanoj por faldi paperajn ĉapon kaj pac-gruon laŭ origamio gvidata de Fuko kaj ŝia avo el Japanujo. Lertaj fingroj helpis por brodi kun Anja el Polujo. Spertaj manoj gravis por ĝuste stiri kajakon sur la rivero Supraŝl, sed ankaŭ por efike malhelpi pikemajn kulojn en arbaro. Viglajn gambojn bezonis infanoj por rapidegi dum la stafetaj ludoj animataj de Matthias al Belgujo. Persistaj gamboj necesis dum la ekskursoj, perfekte planitaj de Iza, profesia ĉiĉeronino el Bjalistoko; tiu-urbe ni vizitis ĉiujn Zamenhofaĵojn.

Pli lertan langon kaj lingvon akiris infanoj dum ludecaj kursoj, trinivele gvidataj de Franciska el Aŭstralio, Elena el Rusujo, Lidka el Polujo. Pli lertan orelon kaj vortaron atingis ĉiuvespera laŭtlegado, rekte en la dormĉambroj, por tiel signali enlitiĝan tempon. Sed laboris ne nur gvidantoj por infanoj, ankaŭ laboretis infanoj, nome prezentis dudek artaĵojn en la internacia vespero por danki al ĉiuj siaj IIK-gvidantoj.

Por ekscii la aliajn programerojn, vi devintus sendi viajn infanojn aŭ nepojn al IIK kaj peti detalan raporton. Se ne, vizitu tiun retejon: [bertosch.free.fr/iik2009fotoj](http://bertosch.free.fr/iik2009fotoj). Ties fotojn ni dankas al Tomek, nia pola profesia fotisto.

Informoj pri Kuba IIK aperos en [bertosch.free.fr/iik2010](http://bertosch.free.fr/iik2010)

Bert Schumann

UEA-komisiito pri IIK

Sur la foto: Infanoj kun braceletoj en la IIK en Supraŝl (Fotis Bert Schumann)

## Homaranisma simpozio

La unua Simpozio pri Homaranismo altiris al KCE en Ĉaŭdefono (17–21 aŭg 2009) dekkvinon da kontribuoj el same multaj landoj, kaj la plejmulto de la aŭtoroj persone alestis, tiel ke en la Esperanto-Domo ekloĝis elito de esperantologio, kaj de zamenhofologio specife.

Francisko Degoul, prezidanto de Scienca Instituto Zamenhof, faris vastan enkondukon pri la celoj de la simpozio, tamen enfokusigante la temon je la lastaj vivojaroj de Zamenhof. La debato emfazis la malkongruon inter homaranismo kaj ŝovinismo.

La demandon trafe esploris Carlo Minnaja, per kompara eseo inter Zamenhof kaj Masaryk. Doktoro Esperanto kaj la unua ĉeĥoslovaka prezidento havis analogajn religiajn interesojn, sed ili tute diverĝis rilate al la futuro de la naciecoj: destinitaj al sendependiĝo kaj kreo de propraj ŝtatoj, por Masaryk; destinitaj al dissolviĝo ene de la granda projekto homarana, por Zamenhof.

Christer Kiselman prezentis la lastan version de sia dekkelkvara prelego, kiu reliefigas paradoksojn kaj kontraŭdirojn en la filozofia pensado de la Bjelostokano. La debato donis la okazon prilumi kelkajn elementojn de la zamenhofa religio.

Pri la rilatoj inter homaranismo kaj cionismo konfrontiĝis du tezoj: tiu de Raymond Brisebois, kunordiganto de Hilelista Esperanto-Komunumo, kaj tiu de Edmond Privat, pritraktita en longa esplora studo de sen. Perla Martinelli.

Sen. Giorgio Silfer prelegis per kompara studo pri la tri ideologioj origine esperantaj: la homaranismo ĉe Zamenhof, la sennaciismo ĉe Lanti, la mondfederismo inspirita de nova interpopola konduto ĉe Privat. Li demonstris ke la pozitivaj elementoj de ĉiuj tri ideologioj konverĝas en la raŭmisma metodo, kiu kondukis al la Esperanta Civito.

Sen. Walter Ŝelazny traktis problemojn en la verkado de Zamenhof-biografio. Tiurilate prof. Ŝelazny starigis plurajn demandojn, kiuj vekis vervan debaton pri la orientiĝo de la Homarano numero unu en la sociaj kaj politikaj eventoj de la epoko.

Pli strikte rilata al la religio de Zamenhof estis la interveno de Zofia Banet Fornalowa (kiu emfazis la rolon de la familio en la judaismo, kaj konsekvence en la provoj apliki homaranismon), kaj precipe la prelego de Armando Zecchin, kiu esploris la kongruon



La sinagogo de Ĉaŭdefono (LF-koop)

inter homaranismo kaj katolikismo. La kongruon inter la religio de Zamenhof kaj tiu de Gandhi pritraktis Henri Masson.

Per tre dokta prelego Paolo Penacchio retrospektivis pri la pensaro de Giuseppe Garibaldi kaj Giuseppe Mazzini, en rilato kun la idealoj de universala lingvo kaj de nova universala religio. La proponoj de la du protagonistoj de la itala releviĝo aparte plaĉis al Lev Tolstoj, kaj influis ankaŭ la judan inteligencion, specife la ekeston de cionismo.

La simpozio aŭskultis ankaŭ la kontribuojn de Paulo Meliz kaj de Jozef Karhan. La dua referencis al la laboro de la karmemora Jeremi Giŝron, forpasinta en februaro 2008.

La lasta tago de la Simpozio pri Homaranismo konsistis el du programeroj: la forumo pri la perspektivoj de homaranismo kaj la konsultiĝo pri la naskota revuo *Homarane*, eldonaĵo de LF-koop, per la ĉefredaktado de sen. Bertil Nilsson, kiu ankaŭ prezidis la tutan simpozion.

Ĉaŭdefono havas la plej belajn sinagogon kaj framasonan templon en la tuta Svislando. La vizitoj, kun detala klarigo de la gastigantoj (kaj perfekta tradukado fare de sen. Giorgio Silfer) okupis du tre interesajn posttagmezojn: niaj zamenhofologoj foriris pli kleraj ol ili alvenis.

**HeKo**

## Kongreso neokazinta

La 1a Irana Esperanto-Kongreso, planita por 19–20 aŭg ne okazis. Du monatojn antaŭ ĝi la organizantoj decidis nuligi la kongreson pro la malbona politika situacio en Irano. Kiam venis la planita dato, la situacio stabiligis. Oni organizis nur seshoran kunvenon 27 aŭg en Sulogun, proksime de Tehrano. Ĉirkaŭ 30 kunvenintoj aŭskultis kvin prelegojn kaj atentis la vidbendan kaj fotan raportojn pri la Bjalistoka UK.

**Keyhan Sayadpour**

## MIRO: la ideala scenaro

2–8 aŭg 2009 mi partoprenis mian unuan Esperanto-renkontiĝon — la 11an MIROn, kiu ĉi-jare okazis en Ĉakovec, en la nordo de Kroatio. Ĉar ĝi estis mia unua Esperanto-renkontiĝo, dum la veturado al Ĉakovec mi penis imagi mian idealan MIRO-scenaron, kiel mi eniros la Esperanto-mondon. Kvankam mi lernis la lingvon pli ol dek monatojn, mi pripensis miajn lingvajn kapablecojn, ĉar mi ne multe konversaciis esperantlingve. Sed, kiam mi eniris la MIRO-ejon, kaj du kiel belaj tiel karaj gastigantinoj bonvenigis min, mi komprenis ke mi zorgis senkaŭze.

Finfine, MIRO montriĝis la plej bona scenaro — scenaro plej interesa kaj amuza. Ĉar ĝi ŝanĝas ĉiujare la nomon (ekzemple, Miskomprena Internacia Renkontiĝo en 1999), sed ne la mallongigon, la ĉi-jara MIRO estis Mojosa Internacia Renkontiĝo. Sed mi komprenis, ke la renkontiĝo ne mojosas mem — la tridek homoj kiuj ĉeestis kontribuis al la eksterordinara etoso. Tion vidis lokuloj, kiam ni la unuan vesperon eliris el loka noktoklubo kaj infektis multajn je nia mojosa dancado. Sorĉitaj de nia internacia etoso, ĉiuj volis scii, kiuj ni estas, kvankam la flago kompreneble jam malkaŝis ĉion.

Tagoj pasis rapide, sed mi sukcesis paroli kun ĉiuj esperantlingve. Mia kono de Esperanto pliboniĝis ĉiutage, kaj, ĉar ne estis multe da kroataj esperantistoj, mi ne povis krokodili.

Tagoj pasis ankaŭ interese. Preskaŭ ĉiutage ni havis ekskurson al kurioza ĉirkaŭaĵo en urbo Ĉakovec kaj al aliaj proksimaj urboj, kiel Varaĵdin, la famkonata kroata urbo de baroko, kaj Ludbreg, afabla urbeto kiu laŭ legendo situas en la centro de la mondo. Dum MIRO okazis kurso de la kroata lingvo, montgrimpadoj kaj remadoj. Sed, mi plej ŝatis la alian flankon de MIRO, ĝian spontanegan flankon, al kiu kontribuis kradrostilo antaŭ nia loĝejo, pasiaj internaciaj pilkludoj, komika karaokeo, fervora kebabo-gustumado, kreiva prezentado de japana kulturo, nokta dancado kun lokuloj sur la ĉefplaco dum urba festivalo ktp.

Por mi la plej bona momento de la renkontiĝo estis la festo ĉe kroata amikino de unu gastigantino, kiam la domo estis plenplena de festemaj geesperantistoj. La mojosa internacia etoso kompreneble lasis postsignon sur tiuj homoj kaj sendube sur mi.

**Krunoslav Puškar**



## Ekotur 2009

La tradicia ekoturisma renkontiĝo Ekotur okazis de la 22a ĝis la 29a de aŭgusto, ĉi-foje en la ĉeĥa distrikta urbo Svitavy, la lim-urbo inter la historiaj landoj Moravio kaj Bohemio, nun en Esperantujo konata precipe pro la tiea Esperanto-muzeo. Partoprenis ĝin dudeko da esperantistoj (pluraj aliaj ĉeestis nur vesperajn programojn) el Belgio, Ĉeĥio, Francio, Germanio, Kanado.

Ili laŭ siaj interesoj dumtage aŭ biciklis sub la gvido de Miloš Bloudek, aŭ piedturismis gvidataj de Petro Chrdle en la bela pejzaĝo de la ĉirkaŭaĝo de Svitavy.

Dum la vesperaj komunaj programoj oni ĝuis en la Esperanto-muzeo prelegojn kaj diskutojn al diversaj interesaj temoj: dimanĉe Petro Chrdle faris enkondukan prelegon pri Ekoturismo; lunde Manfred Westermayer prezentis unue la Asocion de verdaj esperantistoj AVE kaj sekve li enkondukis la temon “verda ekonomio”; marde la partoprenantoj komune vizitis la koncerton de la grupo *Pink Panthers*, kiu rememorigis al ili la rokmuzikon de la sepdekaj kaj okdekaj jaroj, kaj sekve ankoraŭ spektis kelkajn filmojn en Esperanto; merkrede Normand Fleury prelegis pri manĝeblaj floroj, kaj Pavla Dvořáková gvidis krosadon tra *Vikipedio* pri ekoturismaj temoj; jaŭde Margit Turková alproksimigis al la partoprenantoj la etoson de la ĉi-jara Universala Kongreso en Bjalistoko; kaj vendrede Manfred Westermayer prelegis pri videblaj kaj nevideblaj sekvoj de plastajoj en akvo, post kiam oni adiaŭis per komuna kantado kun la muzika akompano de Pavla Dvořáková.

En la itineroj de ambaŭ gupoj, kaj biciklantoj kaj piedturistoj, estis ankaŭ Litomyšl, la urbo listigita kiel kultura heredaĵo ĉe Unesko pro sia unika kastelo, sed inter esperantistoj konata pro la romano de Karolo Piĉ *Litomišla tombejo*. Memkomprene do, ankaŭ la tombegojn ni vizitis kun aparta atento al la tombo de tiu fama Esperanto-verkisto.

**Petro Chrdle**



La vojo de la ekoturanoj ne ĉiam estis glata, foje ili devis travadi riveretojn. (Fotis Miloš Bloudek)

## Tra la mondo sur radoj

Francaj geesperantistoj, Cédric Tro-long kaj Alice Creskens, kiuj vojaĝas per kuŝbicikloj tra la mondo ekde aprilo 2008, en aŭgusto venis al Vjetnamio, akompanataj de la franca junulino Anne kiu kunvojaĝas kun ili en Laoso kaj Vjetnamio per ordinara biciklo.

En Vjetnama Esperanto-Asocio (VEA) kaj en Hanoja Esperanto-Asocio (HanEA) ili rakontis pri medioprotektado, Esperanto-instruado, vojaĝado kaj aliaj temoj. Kun vjetnamaj esperantistoj sur la bordo de Ba Mau Lago ili fotiĝis apud la Zamenhof-arbo plantita en 1999 okaze de la dua Azia Kongreso, kun memorŝtono inaŭgurita de Osmo Buller en majo 2009.

VEA aranĝis por ili renkontiĝon kun respondeculoj de Vjetnama Asocio de Viktimoj de oranĝ-aganto. Dum du horoj ili ricevis informojn pri la damaĝoj kaŭzitaj de oranĝ-aganto kaj ties toksaĵo dioksino al la vjetnama popolo dum la milito kaj eĉ nuntempe.

En la sidejo de Vjetnama Unio de Amikecaj Organizoj la francaj mondvojaĝantoj faris en Esperanto, kun traduko en la vjetnaman, bildan prezentadon pri sia vojaĝo, pri medioprotektado, kaj pri la rolo de Esperanto kiel ligilo kaj amikeca ponto inter la popoloj de la tuta mondo.

Iliaj kuŝbicikloj vekis grandan interreson. La biciklantojn intervjuis la Hanoja Televido kaj la franclingva kanalo VOV8 de la *Voĉo de Vjetnamio*.

**Informada komisiono de VEA**

## Unufraze

★ 31 jul la Komitato de UEA akceptis la Mongolan E-Societon kiel la 70an aliĝintan landan asocion de UEA; nun en Azio estas 11 asocioj aliĝintaj al UEA. (*Esperanto en Azio*)

★ Asocio E-ista de Rio-de-Ĵaneiro estas premiita per la Trofeo *Vi kaj Paco*, kreita de la medio Divaldo Pereira Franco por rekompenci fizikajn kaj jurajn personojn, kiuj elstarigas naci- kaj internaciskale, pro la agado favore al la kulturo de paco. (*Libera Folio*)

★ Direktoroj de Esperanto Studies Foundation (Humphrey Tonkin, Grant Goodall, Timothy Reagan, Bonnie Fonseca-Greber) partoprenis en du seminarioj ĉe la Konferenco de la Internacia Societo por Lingvaj Studoj en Orlando (Florido) 11–13 jun 2009. (ESF)

★ Nazaré Laroca prezentis ĉe la Universitato de Ŝtato Rio-de-Ĵaneiro la tezon *La tempa karaktero de verboj en Esperanto*; oni proponis, ke Nazaré organizu esplorgrupon pri Eo en la universitato k starigita en 2010 E-kurson kadre de Lingvistika Kongreso. (*BEL informas*)

★ En la supera mezlernejo Ikedakita (gubernio Osaka, Japanio) jam dum ses jaroj oni instruas Eon en fakultativa kurso *Komprenu alilandojn* al 17–18-jaraj lernantoj. (*Esperanto en Azio*)

★ Ekde 15 jul ĝis 15 aŭg en la artlernejo School of Creative Communications (Nepalo) Razen Manandhar gvidis E-kurson po tri lecionoj semajne. (*Esperanto en Azio*)

★ La estraro de la Angola E-Asocio interkonsentis kun Pastoro Milton Vosi, la direktoro de la Kristana kolegio “Papa Vosi” pri kunlaboro inter AngEA kaj la kolegio kadre de la projekto *Lernejoj por evoluo*; la interkonsento inkluzivas eksperimentan instruadon de Eo en du klasoj. (Landa Agado)

★ Ĉi-jare UEA membrigis 150 esperantistojn el Azio danke al KAEM: Afganio 1, Azerbajĝano 1, Bangladeŝo 1, Barato 4, Ĉinio 42, Pakistano 20, Filipinoj 3, Indonezio 2, Kamboĝo 1, Laoso 3, Mongolio 5, Nepalo 6, Srilanko 5, Tajlando 1, Turkio 1, Uzbekio 1, Vjetnamio 53. (*Esperanto en Azio*)

★ Steĉjo Norvell donacis al Kanada E-Asocio pli ol 2000 librojn kaj pli ol 300 registraĵojn kaj grandan monsumon por prizorgi la bibliotekon. (*Lumo*)

★ La Estraro de TEJO elektis novan volontulon: Alexandre Baudry el Francio eklaboros 14 sep en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. (tejo.org)



## Dafydd ab Iago el Bruselo

### La kimra malaperos en la kimra parlamento

Ekde la starigo de parlamento en Kimrio, la loka lingvo, la kimra, spertis renovigon. Unu el la atingoj venis lastjare kiam la Eŭropa Unio akceptis la kimran kiel kun-oficialan lingvon. La plej parolata kelta lingvo nun havas la saman statuson en la EU-instancoj kiel la kataluna, eŭska kaj galega. La parolantoj de la kun-oficialaj lingvoj rajtas skribi al la EU-instancoj gepatra-lingve kaj ricevi respondon en sia lingvo. Ministroj, kiuj parolas tiujn lingvojn, rajtas ilin paroli en la konsilio de ministroj.

Eĉ se la decido estas nur simbola, ĝi estas grava simbolo. Ĝi montras kiel la kimra progresas kiel leĝa kaj administracia lingvo. Multe da tiu progreso baziĝas sur la profesiigo de tradukistoj danke al la novaj kimraj institucioj. Tradukistoj ne nur kreis novajn terminojn por juraj konceptoj, ili ankaŭ profesiigis en sia laboro. Tamen nun venas nova minaco al la lingvo. Oficiale la kimra parlamento promesis traduki ĉiujn paroladojn en la plenkunsidoj. Spite al ĉi tiu promeso, la oficejo de la parlamento decidis ekde 2010 traduki nur el la kimra anglan. La decidantoj argumentas ke la kimralingvanoj ja parolas la anglan kaj pro tio ne necesas traduki kimren el la angla (nur anglan el la kimra). Tiu decido, laŭ la oficejo de la parlamento, ŝparos ĉirkaŭ 250 mil britajn pundojn.

Iu ajn decido pri lingvo ĉiam estas ege tikla, certe se temas pri malegala traktado de lingvo parolata de ĉ. 600 mil homoj. Ankaŭ aldoniĝas jarcenta historio de malfavora traktado fare

de la politika kaj leĝa ĉirkaŭaĵo. Pro tia historio aŭdiĝas laŭtaj protestoj spite al la fakto, ke la decido estis farita dum la kvinta somerperiodo. Oni rajte kritikis la malegalan traktadon de la kimralingvanoj. Kial ankaŭ ili ne rajtas legi la debatojn de sia parlamento gepatralingve?

Nova argumento estas la kontribuo de la dulingvaj debatoj al aŭtomataj liberaj tradukservoj. Jam *Google Translate* komencis uzi tiun formon: <http://translate.google.com>. La kimra estas unu el 51 lingvoj inter kiuj eblas traduki.

### Ĉu komisionano por multlingvismo?

Ekde januaro 2007 la Eŭropa Unio havas apartan komisionanon pri multlingvismo. Tiam aldoniĝis la bulgara, rumana kaj irlanda al la aro da oficialaj lingvoj (nun 23), kaj la Eŭropa Komisiono bezonis altnivelan respondeculon pri lingva politiko. Laŭ la prezidanto de la Komisiono, Jose Manuel Barroso, tiutempe la komisionano pri multlingvismo estis nepra por pli bone prizorgi la lingvan politikon de la Unio.

Aŭdiĝas onidiroj, laŭ kiuj ne plu estas dezirata komisionano pri multlingvismo post la renovigo de la nuna komisiono. La nuna komisionano, Leonard Orban, ne plu estos proponata de sia lando. Ankaŭ neniu membro-ŝtato volas la postenon — kiu estas vidata kvazaŭ kiel “ofendo”, ĉar “negrava”. La onidiroj jam estas tiom aŭdeblaj, ke venas protestoj el nebruselaj organizaĵoj. Unu el la protestantoj estas la Reto por Promocii Lingvan Diversecon (NPLD laŭ la anglaj sigloj).

“Ĉiuj lingvoj devus ricevi egalan gravecon. Ili estas la bazŝtonoj de Eŭropo kaj kontribuas al originalaj sociaj interrilatoj. Komisionano pri multlingvismo helpas, certigante tion ĉi”, — diris la direktoro de la neregistara organizaĵo Meirion Prys Jones. La timo estas ke sen altnivela respondeculo, multlingvismo ne estos je la pinto de la politika tagordo.

Tamen estas aliaj voĉoj en Bruselo, laŭ kiuj Orban ne estis bona defendanto de lingvaj rajtoj kaj multlingvismo. La lasta ekzemplo estas la timo de la Komisiono enmiksiĝi kontraŭ la diskriminacia slovak lingvo-leĝo (vidu la aŭgustan-septembran *Ondon*, p. 16).

Jam pli frue en ĉi tiu jaro Orban kunvenis kun kolegoj por starigi oficiale “neŭtralan” starpunkton. Laŭ fontoj en Bruselo, Orban estas serĉanta novan postenon en Bruselo kaj ne volas kolerigi iun ajn. Ankaŭ la prezidanto de la Komisiono, Barroso, ne volas kolerigi membro-ŝtatojn kiuj ankoraŭ ne konfirmis sian subtenon.

### Socisciencistoj enketas

Pli ol 40 kongresanoj el ĉirkaŭ 20 landoj partoprenis en la Bjalistoka UK la kunsidon de SEG, Sociscienca Esperanto Grupo, kiu celas kunligi ĉiujn fakulojn kaj interesitojn pri sociaj sciencoj en larĝa senco. La kunveno de la grupo estis jam la kvina dum UKoj, kio atestas, ke la neformala grupo sen elektita estraro kaj formala strukturo bone fartas. Lastatempe estis starigita ankaŭ retroŝta listo de la grupo.

La diskuto temis grandparte pri la enketo, kiun Zbigniew Galor, Jukka Pietiläinen kaj Johan Derks lanĉis. La celo de la enketo estas esplori la bazajn sin-

tenojn de esperantistoj pri UEA kaj kolekti materialon ankaŭ rilate aliajn interesajn demandojn, ekzemple rilate motivojn de lernado de Esperanto kaj elekton inter kunmetitaj formoj kaj neologismoj. La enketo celas ĉiujn esperantistojn, ne nur la ligitajn al UEA. La rezultoj estos publikigitaj en la revuo *Esperanto*, fakaj socisciencaj revuoj nacilingve kaj en venontjara esperantologia konferenco. Estas planata ankaŭ libro, kiu prezentos la rezultojn de la enketo. Krome la politologia subgrupo sub la gvido de Valentin Seguru diskutis pri aktualaj politikaj temoj.

Partoprenu la enketon, kiun eblas pleniĝi en la reto. Ĝi troveblas per ligo

<http://enketo.shortURL.com>. Interesatoj, kiuj volas aliĝi al la retlisto de SEG, kontaktu [jukka.pietilainen@helsinki.fi](mailto:jukka.pietilainen@helsinki.fi)


Jukka Pietiläinen

### Malfacile eltenebla intervalo

Dankon pro la represo de la interesa artikolo de Stojan. Mi senpacience atendis la duan liveraĵon, ja la intervalo de tri monatoj estis malfacile eltenebla. Mi sugestis, se vi denove faros ion tian, ke vi ne ekzilu la notojn en la finon de la dua parto. La ideologia vidpunkto en la parto IVa estas kurioza kaj certe tre plaĉa por rusaj legantoj...

Marc Bavant





## La slovakia surlinio

E@I elpaŝos ekster la Esperanto-mondo per sia nova projekto *Slovak Online* — retejo por instrui la slovakon lingvon al eksterlandanoj. La eduka agentejo de EU (EACEA) aprobis al la projekto subvencio de 255 mil 819 eŭroj. Tio fortigos la organizaĵon kaj estos utila ankaŭ al esperantistoj, ĉar pluraj teknikoj, uzotaj por la slovakia retejo, estos uzebblaj ankaŭ por lernu.net kaj aliaj projektoj de E@I.

La projekto-propono estis bazita je spertoj de [www.lernu.net](http://www.lernu.net), kiun E@I kreis kaj prizorgas. La retejo estos komence en la angla, germana, pola kaj litova. Ĉar la teamo de E@I estas esperantista, eblas lerni la slovakon ankaŭ pere de Esperanto, kiu verŝajne estos eĉ la laborlingvo de la projekto.

E@I nun havas bonan eblon prezentiĝi ankaŭ ekster la Esperanta mondo. Ekzemple, unu el la partneroj de la projekto estos la fondaĵo de la unua damo de Slovakio, la edzino de slovakia prezidento, s-ino Gaŝparoviĉová.

La projekto povas pruvi, ke Esperanto ne celas forpuŝi aliajn lingvojn, sed povas ludi gravan rolon por ilia disvastigo. E@I pripensas similan monpeton estonte por la pola, ĉeĥa kaj aliaj lingvoj.

Eble fine venos tempo, kiam ni, esperantistoj lernos pli bone utiligi la eksterajn monfontojn por nia agado.

Peter Baláž

## Reta paradizo por la kantemaj esperantistoj

Krom siaj “kernaj” projektoj E@I helpas realigi al aliaj siajn ideojn, proponante lokon ĉe sia servilo, teknikan helpon, iom da reklamado k.s. Verŝajne la plej granda kaj interesa inter tiuj projektoj estas *Kantaro*.

Ĉe la adreso: <http://ikso.net/kantaro/> troveblas la plej granda kolekto de kantoj en Esperanto kaj ĉio, kio rilatas al ili: tekstoj, notoj, retligoj, kaj eĉ pli multe. Se oni serĉas tekston de Esperanto-kanto, aŭ volas ekscii detalojn pri certa artisto, muzik-grupo aŭ simile, la plej bona spaco en Interreto estas ĝuste la *Kantaro*.

En aŭgusto 2009 la nombro de kantotekstoj superis 1000.

En la kreado de la kantaro partoprenis/as pluraj esperantistoj. Granda danko apartenas ĉefe al la motoro de la retejo: Aleksej Kuznecov el Ruslando, kiu senlace prizorgas la retejon kaj kunordigas la laboron.

Ĉar temas pri vikia sistemo, kiun oni ĉefe konas de Vikipedio, eblas aktive partopreni en la projekto kaj pliriĉigi la enhavon de la paĝaro. Eblas aldoni tekstojn, muzik-notojn, aperigi informojn pri artistoj, kantoj k.s. Grava estas la respekto de kopirajto kaj aŭtoraj rajtoj, kiel atentigas ankaŭ la retejo: “Bonvolu ne uzi kopirajtitajn materialojn sen permeso de aŭtoro.”

Peter Baláž

## Szerdahelyi — ankaŭ nun valida

Profesoro István Szerdahelyi (1924–1987) estas konata kiel la fondinto de la unika Esperanto-fako de la Budapeŝta Universitato Eötvös, kiel diligenta interlingvisto, kiel esperantologo, kiu en multaj artikoloj provis science priskribi esperanton, kiel entuziasma pledanto por la lerneja instruado de esperanto.

En la okuloj de siaj gestudentoj li estis denaska instruisto, kiu kapablis prezenti seriozan materialon en amuza formo. Antaŭ sia morto li iĝis membro de la Akademio de Esperanto (AdE) malgraŭ la pli fruaj konfliktoj pri la radik-karaktero, prezidis ILEI kaj fariĝis honora membro de UEA.

Okazis prelego pri li dum la ILEI-konferenco, kaj dum UK mallonga simpozio (sub la aŭspicio de AdE kaj CED) estis dediĉita al István Szerdahelyi. Prezintis lin kaj lanĉis la libron *Abunda fonto* omaĝe al li Ilona Koutny, iama studentino kaj lia posteulo en ELTE dum jardeko.

Liajn — daŭre aktualajn — temojn traktis liaj iamaj gestudentoj kaj kolegoj, kiujn li iel influis: Probal Dasgupta analizis la morfeman sistemon de esperanto; Renato Corsetti la propedeŭtikan valoron de esperanto de Szerdahelyi ĝis *Springboard*. Zsófia Kóródy prezentis la provojn de Szerdahelyi enkonduki esperanton enkadre de instruado de fremdaj lingvoj; István Ertl specifajn aspektojn de tradukado el kaj al esperanto. La specifajojn de la esperanta leksikografio kaj uzon de komputiloj en leksikografio skizis Ilona Koutny, kiu gvidis la programon.

Tuttaga memorfesto dediĉita al prof. Szerdahelyi sekvis en Budapeŝto la 30an de aŭgusto kun partopreno de lia familio (edzino, du filoj, kvin nepoj). Enkondukis la memortagon Imre Szabó, la prezidanto de HEA. Rememoris pri la meritoj de Szerdahelyi la nova ILEI-prezidanto, Stefan MacGill, kaj transdonis salutojn Zlatko Tišljari, kiu poste prezentis filmitan intervjuon kun la festato.

Post la prezento de vivo kaj verko de prof. Szerdahelyi far Ilona Koutny kaj transdono de la memorlibro, prelegis iamaj hungaraj kolegoj kaj studentoj: Blazio Vaha pri gramatikaj temoj de Szerdahelyi, Árpád Rátkai skizis la vojon de Zamenhof ĝis Szerdahelyi, György Nanovszky traktis lingvopolitikon, Márta Kovács la novajn lingvoekzamenojn, Zsófia Kóródy instruadon, kaj István Ertl tradukadon. Kvankam lia granda atingo, la Esperanto-fako de ELTE ĵus finis sian agadon, liaj disĉiploj plu agas kaj la scienca aliro al esperanto, por kiu li pledis, daŭre trovas apogantojn. Liaj ideoj ankaŭ nun estas vivantaj.

I.K.

26-an de aŭgusto pro trafika akcidento forpasis  
**Jorge Carlos Mosonyi (1947–2009)**  
konata lingvisto, profesoro de la Centra Universitato de Venezuelo, aktivulo por indiĝenaj lingvoj, esperantisto ekde 1973, prezidanto de Venezuelana Esperanto-Asocio.  
*Ni funebras kaj kondolencas.*

# Zamenhof, ne nur “naiva revanto”

**Korĵenkov, Aleksander. *Homarano: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof*. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2009. — 320 paĝoj. — (Serio *Scio*; №8).**


Mi recenzas certe la plej bonan biografion de Zamenhof verkitan ĝis nun. Ĝi konsistas el 15 ĉapitroj, en kiuj la aŭtoro esence analizas tri vastajn problemojn: la striktan biografion, la lingvajn reformojn (pri kiuj mi ne okupigos) kaj la ideologion de Zamenhof. La verko kun la apoteka precizeco strebas ĝuste strukturi la faktojn pri la vivo de la Majstro, kiel neniam antaŭe, sed antaŭ ĉio ĝi rompas kun la tradicia diskurso pri Zamenhof.

En la tradicia diskurso, ripetata de Ziółkowska, Boulton, Centassi, Masson kaj aliaj (kun kelkaj esceptoj) ni havas pli malpli ĉiam ripetigantan apologian skemon konstruitan komence surbaze de la fama letero de Zamenhof el 1895 al Nikolaj Afrikanoviĉ Borovko, do unue Bjalistoko kun la multnacia loĝantaro, poste mizera vivo de la Varsovia kuracisto (sic!), poste ni vidas la noblan strategion de Zamenhof lanĉi la homaranismon, kiu potencie konstruos la mondon sen konfliktoj, dank’ al la internacia lingvo Esperanto...

Feliĉe, Aleksander Korĵenkov ne iras per ĉi tiu tradicia vojo *à la* Borovko, kiun “plibeligis” post Zamenhof esperantistoj mem, ne por montri la strebojn de Zamenhof, sed por firmigi sian esperantan identecon for de judaismo. Korĵenkov, komencante sian verkon, pafas trafe kaj ĝuste tuj per la letero de Zamenhof el 1905 al Alfred Michaux kaj tiel komencas sian rakonton pri Zamenhof. Ĉio ĉi ŝanĝas ĝisnunan apologian perspektivon pri la Majstro.

Korĵenkov faras ankaŭ pli malpli historian skizon de la “juda” geografio de la Ruslanda Imperio, kie subite dum la imperiestrado de Katerina la Granda aperis en Ruslando 1.200.000 judoj, antaŭe ne konataj grandskale en la imperio. Kaŭzis tion dispartigo de Pollando kaj Litvo (1772–1795), per kiu pollandaj kaj litvaj judoj estas metitaj en tiel nomata *Ĉerta osedlosti*, tio estas en la larĝa zono de la Balta al la Nigra Maro, sen ebleco ŝanĝi loĝlokon. Ili grandparte estis iam “polaj” judoj, kiuj post la politikaj intervenoj de Ruslando, Pruslando kaj Aŭstrio kontraŭ la

Respubliko de Du Popoloj (konfederacio de Pollando kaj Litvo) fariĝis ekde la fino de la 18a jarcento “civitanoj” de tiuj tri Imperioj, sed grandparte ruslandanoj.



Grava afero montrita de Korĵenkov estas la aparta grupo de la judoj en la norda parto de *Ĉerta osedlosti*, kiujn Korĵenkov ĝuste nomas *litvakoj* (p. 27), el kiuj devenas Lazaro Ludoviko kaj Klara. Ili diferencigis de la ĥasidoj (sud-orienta Pollando, okcidenta Ukrainio) kaj de “progresemaĵ” judoj sub la influo de Haskala. Li mencias diversajn ideologiajn judajn vojoj de cionismo ĝis BUND. Tio aparte gravas, ĉar neniu povus ĝuste kompreni la konfliktojn judan-polan-rusan sen scii pri litvakoj, kiuj komencis okupadi en la Imperio la rolon de rusigistoj de la poloj, ofte en gravaj imperiaj postenoj. Objektive Korĵenkov notas tiujn esencajn kaj negativajn por poloj ŝanĝojn en la “mentaleco” de litvakoj jene: “Post la ribelo [de Poloj kontraŭ Rusoj — WŹ] en 1863–1864 litvakoj ricevis pli da fido ĉe la Ruslanda administracio, ĉar ili plejparte ne subtenis la ribelantojn. Pluraj polaj instruistoj estis maldungitaj [200 mil poloj estis ekzilitaj al Siberio — WŹ], kaj Marko Zamenhof ricevis instruistan postenon en la gimnazio de

Bjalistoko, kaj tiel ekapartenis al la klaso de Ruslandaj ŝtatoficistoj” (p. 29). En tiu ĉi nova politika kaj socia pozicio de litvakoj oni devas serĉi la fontojn de la konflikto inter Zamenhof kaj *Pola Esperantisto*. La kritiko de Talmudo estis nur primitiva preteksto por montri starpunkton de polaj esperantistaj naciistoj vid-al-vid al litvakoj (p. 256–258).

Ni ne forgesu, ke ĉio ĉi okazas sur la fono de la kreskanta antisemitismo en la tuta Eŭropo (la afero de Dreyfus en Francio) kaj en Ruslando mem, kiam post la murdo de la imperiestro Aleksandro II oni akuzis la judojn pri la atenco, kvankam la atencon faris la “pola beloruso” Ignacy Hryniewicki el la organizo *Narodnaja Volja*, kaj ekde tiam komenciĝis pogromoj. Mi mencias tiun kontribuon de Korĵenkov kiel tre gravan, kvankam iom diskutindan el la pola vidpunkto. Mi ĉi tie ne kritikis lian starpunkton, sed mi substrekas, ke Korĵenkov kuraĝe metas en la biografion de Zamenhof novajn cirkonstancojn por pli bone fiksi Zamenhofon en la epoko de la eksplodantaj imperioj, kion ofte ne komprenas okcidentaj kaj japanaj zamenhofologoj.

En la libro aperas biografiaj novaĵoj, kiuj praktike ŝanĝas ne multon en la Zamenhofa vivo, sed atestas pri la precizeco de la aŭtoro serĉi kaj kontroli novajn fontojn pri Zamenhof, ekzemple, ke la familio de Zamenhof (malkovro de Zbigniew Romaniuk) devenas ne de Tykocin, sed de Suwałki (p. 28).

Multfoje Korĵenkov refutas ofte senbazajn atestojn kaj legendojn pri la vivo de Zamenhof: pri la bruligo de la manuskriptoj fare de lia patro (p. 47), pri la cionismaj poemoj de Zamenhof (p. 45), pri la maldungo de Marko de la posteno de la cenzuristo pro la afero ligita kun aĉetado de alkoholaĵoj fare de Aleksandro III (p. 56) ktp.

Ĉiujn biografiajn dubojn Korĵenkov komentarias en la abundaj, dokumentitaj notoj, dignaj de scienca disertacio sur la paĝoj 278–312, kie li montras aldone sian personan engaĝiĝon trastudi arkivojn en Peterburgo, Moskvo, Grodno kaj Kaŭno, kie teorie oni povus ion ankoraŭ trovi pri la Majstro. Abrupte aperas en la tute nova perspektivo la Grodna periodo de Zamenhof, kie Korĵenkov malkovras malentuziasmiĝon de Zamenhof pri “nia afero”, kiu ŝanĝiĝas abrupte post la subskribo de la kontrakto kun la Pariza eldonejo *Hachette* (p. 110–121) kiu garantiis al Zamenhof relative dignan vivon. Eĉ se



la priskribo de la Grodna periodo povas ŝajni iom troiga, la aŭtoro konsekvence analizas — kaj tio ankaŭ estas io tute nova en ĉiuj ĝisnunaj biografioj de Zamenhof — liajn spiritan kaj materian vivojn kune. Estas vero, ke komence de sia profesia vivo Zamenhof gajnis malmulte, kaj ke sen la helpo de la bopatro eble li devus eĉ ŝanĝi sian profesion, sed ankaŭ estas vero, ke de lia kvardeka vivojaro ŝanĝiĝas liaj financaj problemoj. La apologia tradicia diskurso pri Zamenhof lasas al ni la bildon de Zamenhof kiel povrulo, dum la aŭtoro de Esperanto sukcesas eduki siajn du infanojn en la Laŭzana universitato kaj kelkfoje ripozi en la kuraclokoj en la verda Silezio, kio tiutempe eblis nur inter prosperaj judoj.

Mi volas nun turni mian atenton je pli grava temaro, kiun tuŝas abunde la verko de Korĵenkov, nome je la deĉifrado de la hilelismo/homaranismo. Denove Korĵenkov aperas kiel perfekta serĉanto, kiu studas kaj komparas ĉiujn vortojn kaj ideojn lasitajn de Zamenhof. Ni havas ordigitan kronologion de lia ideologio: ni rimarkas kiel Zamenhof ĉiufoje ŝanĝas la publikon (unue li turnas sin al judoj, poste al esperantistoj, fine al homoj “de bona volo”), ĉiufoje ŝanĝante akcentojn de sia filozofiumado (komence solvi la judan problemon, poste unuigi l’ homaron, fine krei “la novan popolon”) ktp.

La deĉifrado de la penso de Zamenhof ne estas facila, kaj mi pensas, ke Korĵenkov (sed verdire, ĝis nun neniu alia) ne scipovis ekzegezi la penson de Zamenhof.

Dekoj da esperantistoj dronas en la supozoj, kion volis esprimi Zamenhof en la homaranismo. Oni serĉas senfine la fontojn de lia scio, sed vane. Zamenhof, ĉampiono de la kamuflado, permesas al ni nenion diveni. Korĵenkov montras supozojn de Igorj Simonov, ke Zamenhof ĉerpis ideojn pri la religia unueco de la rusa filozofo Vladimir Solovjov kaj de la judgermano Hermann Cohen (p. 274–276). Poste aperas kelkaj aliaj aŭtoroj kiuj supozas, ke fontojn de la scio de Zamenhof ni povas eventuale trovi ĉi tie aŭ alie. Korĵenkov mem ne donas la respondon, ĉar li ĝin ne konas; li modeste kaj honeste lasas nin kun ĉiam ne solvita demando homaranisma.

La nova biografio de Zamenhof verkita de Aleksander Korĵenkov, kiel neniu antaŭa, estas majstra verko verkita kun la benediktana pacienco, precizeco kaj

## Enhavtabelo de *Homarano*

Aleksander Korĵenkov. Antaŭparolo . . . . .	3
Prologo: Letero de L.L. Zamenhof al Alfred Michaux . . . . .	7
Ĉapitro 1. Vojaĝo inter la nomoj . . . . .	17
Ĉapitro 2. La patro kaj la filo . . . . .	35
Ĉapitro 3. En serĉado de “nekaptebla io”. . . . .	59
Ĉapitro 4. La Unua Libro kaj la sekvo. . . . .	72
Ĉapitro 5. La naskiĝo, la vivo kaj la morto de “(La) Esperantisto” . . . . .	86
Ĉapitro 6. Ĉu esti aŭ ne esti? . . . . .	104
Ĉapitro 7. La unua mesaĝo el ekzilo . . . . .	122
Ĉapitro 8. La dua mesaĝo el ekzilo . . . . .	141
Ĉapitro 9. La sorto komencas esti pli favora. . . . .	158
Ĉapitro 10. Preĝo sub la verda standardo . . . . .	171
Ĉapitro 11. Mi estas homo. . . . .	188
Ĉapitro 12. Konsiliĝu neniam kun lingvistoj. . . . .	207
Ĉapitro 13. Verkoj, kiuj honorigas la homaron . . . . .	227
Ĉapitro 14. Ĉiu lando plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj. . . . .	249
Ĉapitro 15. Ho, mia kor’, ne batu maltrankvile. . . . .	264
Notoj. . . . .	278
Konciza biografio de d-ro L. L. Zamenhof . . . . .	313
Esenca bibliografio . . . . .	316
Enhavtabelo . . . . .	320

fontaj pruvoj. Ĝi estas eldonita perfekte, kaj kvankam verkita sub la premo de tempo, ĝi plenumas ĉiujn eldonajn postulojn, kaj mi ne plendas pro la manko de la indekso. Aldone ĝi enhavas du tre gravajn kaj novajn trajtojn ĝis nun ne konatajn en Esperantujo.

Unue, ĝi rompas kun la tradicia diskurso pri Zamenhof, do ne plu Varsovia okulisto, sed la judo de geto; ne plu amiko de la tuta homaro, sed foje cionisto, foje “kosmopolito”; ne nur “naiva revanto”, sed realisto; ne malriĉa kompatindulo, sed homo scipovanta perfekte regi siajn en- kaj elspezojn; kaj kiu fine de sia vivo, post la glora entrepreno “plibonigi” la homaron, aperas kiel malsana homo, laca de la vivo.

Due, ĝi montras — nekredible malfacilan por deĉifri ĝin — la filozofian strebadon de Zamenhof konstrui la

novan “filozofion”, kaj Korĵenkov perfekte scipovas distanciĝi de absurdaj konkludoj kun la konscio esprimita en la lastaj frazoj, pri la granda laboro, kiu restas farenda de zamenhofologoj.

La verko de Aleksander Korĵenkov pri Ludoviko Zamenhof fermas la epokon de la erarvoja apologia kaj finvenkisma diskurso pri Zamenhof, kiu servis montri Zamenhofon disde la juda problemaro de la epoko, kiel nur la kreinton de la internacia lingvo Esperanto, kaj malfermas la vojon al la nesolvitaj ĝis nun teorie kaj praktike problemoj de gentaj studoj, kion dum sia tuta vivo celis Zamenhof, kaj kie la nocio *gento* apartenas al unu el la plej esencaj. Mi rekomendas la libron *Homarano* al ĉiuj, kiuj esprimiĝas pri Zamenhof, foje sen scii pri kio ili esprimiĝas.

**Walter Ŝelazny**

## Homaranisma revuo aperos

Estas plejparte difinita la eldona profilo de la nova revuo *Homarane*, kies unua numero estos lanĉita okaze de la Tago de la Esperanta Kulturo, 15 dec 2009, kun la subtítulo: “kajero en esperanto pri socio, filozofio, religio”. La unua numero enhavos la aktojn de la unua Simpozio pri Homaranismo, ĵus okazinta en Ĉaŭdefono.

La formato de *Homarane* estos B5. La kovropaĝon realigos la arta direktoro de LF-koop, sen. Perla Martinelli. La interno estos tamen tute realigita, laŭ redakto kaj enpaĝigo, en Svedio, sub la respondeco de la redaktoro, sen. Bertil Nilsson. La presejo situos en Milano, la stokadon kaj la ekspedon prizorgos nova kunlaboranto de Itala Interlingvistika Centro.

La tarifo de *Homarane* estas fiksita je 18 eŭroj numere, inkluzive de la sendokostoj. Oni povas mendi nur la unuan numeron; aŭ la unuajn tri numerojn, ŝparante 20%.

**HeKo**

## Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (14)

de Halina Gorecka

### De reĝlando al imperio

La Viena kongreso (1815), nomata “dancanta” pro la emo de la kongresanoj al baloj, signis limon de ŝtorma epoko. La granda korsikano, pacigita per la unuigitaj fortoj, estis ekzilita al la insulo Sankta Helena.

Anstataŭ Sankta Roma Imperio de la Germana Nacio, dissolvita en 1806, en 1815 aperis la Germana Unio kun 39 sendependaj ŝtat(et)oj. La gvidan rolon en ĝi havis Aŭstrio, kio malkontentigis Pruslandon.

En 1862 Otto von Bismarck (1815–1898) iĝis ĉefministro de Pruslando. La rivaleco inter Aŭstrio kaj Pruslando kondukis en 1866 al malkaŝa milito, en kiu la Pruslanda armeo frakasis la Aŭstrian. Anstataŭ la Germana Unio en 1867, laŭ la iniciato de Bismarck, estis kreita la Nordgermana Unio, al kiu aliĝis krom Pruslando, ankaŭ etaj ŝtatoj de Norda Germanio.

La 19an de julio 1870, danke al lerta misinformado de Bismarck, Francio deklaris militon al la Unio, kaj la Pruslanda armeo rapide venkis la armeon de Napoleono III. La 18an de januaro 1871 en Versajlo fondiĝis la Germana Imperio kun Vilhelmo I (1797–1888) kiel la Imperiestro kaj Bismarck kiel la Regna Kanceliero. Al ĝi baldaŭ aliĝis preskaŭ ĉiuj germanaj ŝtatoj krom Aŭstrio.

Bismarck efektivigis pragmatan politikon, kies celo estis unuigo de la malfirma imperio. Novaj leĝoj unuecigis la justicon, ekonomion, administradon kaj monsystemon.

### Ordinara provinco

En 1878 la Okcidenta kaj Orienta Pruslando denove iĝis apartaj provincoj. La Orienta Pruslando havis agrikulturan karakteron. Meze de la 19a jarcento ĝia urba loĝantaro konsistigis nur 11%, kompare kun 26% en Vestfalia, 28% en Saksio kaj 37% en Brandenburgio.

En 1875 en la Orienta Pruslando loĝis germanparolantoj 73,48%, polparolantoj 18,39% kaj litovparolantoj 8,11%. En 1900 el 1.996.626 loĝantoj estis 1.698.465 luteranoj, 269.196 romkatolikoj kaj 13.877 hebreoj. La malaltgermana dialekto dominis en la Orienta Pruslando, la altgermanan oni parolis en Varmio. Pollingvanoj loĝis ĉefe en la sudo (Mazurio kaj Varmio), kaj litovoj



Otto von Bismarck

en la nordoriento (Litovio Minora). La prusa etno estis delonge germanigita (parte litovigita) kaj la antikva prusa lingvo mortis en la 18a jarcento.

La konstruado de la fervojo Berlino-Kenigsbergo en 1853 kontribuis al vastigo de la merkato kaj stimulis evoluigon de la orienpruslanda brutbredado.

En la provinco oni bredis ŝafojn kaj bovojn. Distingiĝis du centroj de ĉevalbredado: nord-oriento (Ebenrode, Tilsit, Ragnit) oni bredis kurĉevalojn, okcidente (Rössel, Marienburg, Elbing) oni specialiĝis pri laborĉevaloj. Famon ricevis la kurĉevaloj el Trakehn.

Estis efektivigata grundplibonigo, drenado, konstruado de kanaloj, ĉio ĉi ebligis uzadon de tero por grenplantado. La Orienta Pruslando plene kontentigis siajn bezonojn pri tritiko kaj eĉ havis superrestaĵon. De tre longa tempo ĉi tie ĝuis renomon bierproduktado. En 1824 en Kenigsbergo funkciis 85 bierfarejoj, ilia nombro plu kreskis. Unu el popularaj specoj de biero nomiĝis *Ostmark*. La ĉefa bierproduktado estis en la bieno Ponart, ĉi tie estis konstruita bierfabriko kun famaj keloj, kiuj tenis malvarmon pro proksime situantaj deponejoj de la natura glacio. Komence de la 20a jc. ĝi iĝis la ĉefa produktejo en la tuta nordoriento de Germanio, 90% da produktado konsistigis la speciala marta biero.

En 1830 en Kenigsbergo aperis la unua akvokondukaro, tri jarojn poste sur

la rivero Pregel eknavigis la unua vaporŝipo. Post dudeko da jaroj la urbajn stratojn lumigis gasaj lanternoj. En 1895 elektraj tramoj anstataŭis ĉevaltramojn. En 1878-1901 la provinca ĉefurbo estis komplete provizita per kanalaro, komenciĝis ĉiutaga akvopurigo de la stratoj. La vivo de urbanoj iĝis pli moviĝema, kreiĝis novaj ekonomiaj kondiĉoj por kresko de produktado.

La teritorion de la provinco plektis fervojaj linioj. Danke al fervojo kaj telegrafo inter Ruslando kaj la Orienta Pruslando ekestis rapida kaj stabila komunikado. Ekde tiam Orienta Pruslando, kaj unuavice Kenigsbergo, ekludis gravan rolon en la tranzito de Ruslandaj varoj. Preskaŭ tri kvaronojn de la specoj de Kenigsberga haveno konsistigis Ruslandaj varoj aŭ krudmaterialoj. Kreskadon de la tunaro de varoj venantaj tra Kenigsberga haveno favoris malpliigo de tarifoj por veturigo de Ruslandaj varoj al la havenoj de Kenigsbergo, Memel, Pillau. En 1906 la kanalo Kenigsbergo-Pillau estis profundigita, kio ebligis eniron de grandaj maraj komercaj ŝipoj.

La provinco ne havis proprajn ercon, karbon. Ilia enportado ebligis evoluigi en la 19a jc maŝinkonstruadon. Ĉe ĝia ĝermo estis brito Charles Hughes, forlasinta sian patrujon por nova perspektiva entreprenado en la Orienta Pruslando. Li edzinigis filinon de ŝipposedanto, estro de granda komerca firmo kaj kune kun li kaj aliaj partneroj fondis en 1828 Union por gisproduktado, kiu ludis grandan rolon en la industria progreso de la provinco. En 1848 oni komencis produkti vaporŝipojn kaj lokomotivojn. La entrepreno vastigis sortimenton: dragiloj, vaporkaldronegoj, maraj konteneroj, leviĝantaj pontoj. Interalie, ĉiuj leviĝantaj kaj turneblaj pontoj de Kenigsbergo estis projektitaj kaj kreitaj en tiu ĉi entrepreno.

Ĝis la 1860aj jaroj elminado de suk-ceno estis tre magra. La riĉaj resursoj praktike ne estis ekspluatataj. La situacion ŝanĝis Moritz Bekker, kiu luis minejon, instalis vaporan dragmaŝinon ĉe la Kurŝa golfo kaj ĉe la baltmara bordo, post la aĉeto de la bieno Palmniken, kie li fondis la solan en la mondo sukccenan entreprenon.

Evoluis la industrio de ripozo. En 1816 en urbeto Cranz estis malfermita la unua ĉemara kuraĉloko. Al ĝia populariĝo kontribuis la fervoja linio el Kenigsbergo, inaŭgurita la 31an de decembro 1885. Dum la unua jaro ĉi tiun fervojon uzis ducent mil pasaĝeroj.

Daŭrigota



## Poemoj de Nikolaj Jazykov

**Nikolaj Miĥájloviĉ Jazykov** naskiĝis la 4an (16an) de marto 1803 en riĉa nobela familio en la urbo Simbirsk (nun Uljanovsk) ĉe Volgo. Studante minindustrion kaj fervojon en Peterburgo kaj filozofion en Derpt (nun Tartu) li ne fervoris pri la scienco, sed preferis diboĉeman vivon kaj poezion, famiĝinte kiel “poet’ de ĝojo kaj ebrio”. En la plejparte germanlingva studenta ĉirkaŭaĵo en Derpt li fondis rusan rondeton kaj verkis patriotajn elegiojn kaj kantojn. En 1829 Jazykov ekloĝis en Moskvo, kie li verkis *Naviganton* kaj aliajn popularajn poemojn, el kiuj kelkaj iĝis kantoj aŭ romanoj. En 1833 li grave malsaniĝis (misfunkcio de la spina medolo). En 1837 li forveturis kuracocelo en Germanion kaj Italion. En 1843 li revenis al Moskvo kaj proksimiĝis al la “slavofilaj” rondoj. Pro la poemo *Al ne-niaj* (verkita en 1844, sed publikigita nur en 1871) li estis draŝita de la “okcidentema alo” kiel reakciulo. Kelkaj liaj lastaperiodaj poemoj (*Tertremado*, *Ŝtormo*, *Naĝado en maro* k.a.) estas inter la plej belaj lirikaĵoj iam ajn verkitaj en la rusa lingvo. Nikolaj Jazykov mortis la 26an de decembro 1846 (la 7an de januaro 1847).



### MUZO

*Diin’ de kordoj vivas pli,  
Ol dioj de tondrad’ kaj ŝtalo,  
Ne donis al katenoj belajn manojn ŝi  
En la epok’ de malmoralo.  
Plu ĉie regas morto kaj milit’,  
Senbrida fort’ en moŝta krono;  
Kaj ĝi detruis sen hezit’  
Altaron de belec’ kaj bono;  
Sed el ruinoj kaj dezert’,  
El silentado de malvivo,  
Leviĝis kun majesta cert’  
Anĝel’ senmorta de kreivo.*

### ROMANCO

*“Sinjoro, ĉu vidas vi arbojn en for’?  
Sub ili ĉifitas la herbo, sinjor’!”  
— Sed kiu tretumis sur juna herbar’?  
Ho, kiu kanajlo, aroga sen bar’?  
“Hierau alvenis post la tago-fin’  
al ĝi ĉevalisto kaj juna fraŭlin’.  
Tutnokte kuŝadis, en plena malhel’;  
Fraŭlin’, onidire — filin’ de nobel’.  
Sur ŝi gaza robo blankadis en klar’;  
Du rozoj skarlatataj en nigra buklar’;  
Juvel’ diamanta, zon’ — blua kolor’,  
Kaj ĉeno el oro, kaj kruco el or’.  
Mi vidis: eniris ŝi domon sen tim’,  
. . . . .”  
Sinjoro paliĝis pro kora sufer’:  
Rekonis li tuj fianĉinon, en ver’.*

### ELEGIO

*Silentas tondro de popolo,  
Kaj katenitas rusa saĝ’,  
Kaj subpremita libervolo  
Impeton kaŝas de kuraĝ’.  
Ho! Longe ĉenoj de sufero  
Ne falos de patruja sin’,  
Jarcentoj pasos en rutin’ —  
Kaj ne vekigōs Rusa tero!*

### PREĜO

*Mi petas sanktan providencon:  
Kun premaj tagoj lasu min,  
Sed donu fere paciencon,  
Ŝtonigu l’ koron en la sin’.  
Senŝanĝa venu mi al pordo  
De mia nova viv-real’,  
Samkiel venas al la bordo  
La Volga ondo sen disfal’!*

\* \* \*

*Ve! Konvinkiĝis mi decide kaj tutcerte,  
Ke ne por mi vi ĉarmas kaj belegas tre:  
Por mia korpo ja tro grandas vi, laŭsperte,  
Sed por animo mia etas vi, ho ve.*

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**

Danke al Valentin Melnikov nia *Rusa Antologio* atingis sian dekan paĝon. Ĉi tiu serio daŭros ankaŭ en la estonteco, kaj vin atendos konatiĝo kun poemoj de Puŝkin, Lermontov, Tjutĉev, A. K. Tolstoj, Nekrasov kaj de aliaj rusaj poetoj. Ĝis nun en ĉi tiu rubriko aperis poemoj de:

- №153. Miĥail Lomonosov
- №156. Aleksandr Sumarokov
- №158. Miĥail Ĥeraskov
- №160. Ippolit Bogdanoviĉ
- №163. Gavriil Derĵavin
- №165. Vasilij Ĵukovskij
- №168. Konstantin Batjuŝkov
- №171. Pjotr Vjazemskij
- №173. Jevgenij Baratynskij
- №180. Nikolaj Jazykov



## Literatura Mondo

Malmultaj revu-nomoj havas tiel altan kaj samtempe pluroblan signifon por la Esperanta literaturo kiel *Literatura Mondo*. Revuo kaj eldonejo, ĝi estas preskaŭ sinonimo ankaŭ de la “Buda-peŝta skolo”.

Prestiĝaj nomoj kiel la du ĉefredaktoroj Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy, la redaktoroj Károly Bodó, Ferenc Szilágyi kaj Lajos Tárkony — sed ankaŭ Gaston Waringhien, Henri Vatré, Hendrik Adamson kaj dekoj da aliaj — ligiĝas al LM. Kaj ankaŭ homoj kiuj elstaris ne ĉiam beletraj, sed sen kiuj LM ne ekzistis en la 1920aj, respektive 1930aj jaroj: la fondinto Teodoro Schwartz (1894–1968) kaj la posta administranto Vilmos Bleier (1903–40). Pri la unua, la patro de la multmiliardulo George Soros, oni klaĉas ke li fondis la familian riĉecon per lu-domoj aĉetitaj el la profito de LM; la dua estis organiza kaj financa genio, kies Asocio de Esperantistaj Libro-Amikoj (AELA) kolektis preskaŭ mil abonojn tuj en sia unua jaro. (Schwartz forpasis 74-jara en memelektita Novjorka ekzilo; Bleier ĝisvivis nur duonon de tiu vivtempo kaj mortis en Pariza hospitalo, la tagon de la germana enmarŝo.)

LM, ĉefredaktata de Kalocsay kaj, ĝis 1933, ankaŭ de Baghy, ludis la centran rolon por la evoluo de la Esperantaj lingvo, beletra kaj tradukarto: ĝi estas nia tuŝebla fundamento. William Auld nomis ĝin “la herooa revuo”. Auld nombris, ke la revuo aperigis 423 originalajn poemojn, kaj eĉ pli da tradukaj: 620 verkojn el 31 lingvoj. Per tio unuflanke pleniĝus tuta antologio da Esperanta poezio (kaj Auld efektive multe ĉerpis el LM por la *Esperanta Antologio*), kaj, aliflanke, eblas kontempli vastan panoramon de la monda literaturo.

LM fenikse travivis tri periodojn: 1922–1927, 1931–1938, kaj 1947–1949, kio egalas al 16 jarkolektoj kun entute 3148 paĝoj. Jardekojn poste, en Japanio eĉ fondiĝis Kooperativo por Represo de *Literatura Mondo*, kiu atingis en 1974–1976 sian celon reprodukti LM, en ses volumoj utile indeksitaj, per nuraj 300 ekzempleroj. (Se licas entrudi privatan memoraĵon: por mi tiuj ses volumoj, konsulteblaj ĉe la Esperanto-fako en Budapeŝto, malfermis konfidencan enirpordon al la postdomoj de nia verda tradicio. Ĝis nun kortuŝas min revidi tiujn bordozkolorajn dorsojn.)



Reprodukti nuntempe eblas ne nur papere. Ankaŭ en la reto legeblas kelkaj LM-numeroj kaj -tekstoj, ekz. ĉe la paĝoj [tekstoj.nl/lm](http://tekstoj.nl/lm) kaj [esperanto.net/literaturo/lm](http://esperanto.net/literaturo/lm), kaj kompleta enhavlisto konsulteblas ĉe <http://www.freeweb.hu/egalite/vinyc/literaturamondoenhavo.pdf>.

Per selekta enhavo kaj digna aspekto, LM povis funkcii kiel eleganta vitrino por nia beletra. Sed pli ol tiu funkcio reprezentis eksteren gravis ĝia rolo kiel “normaligilo” de beletra, kaj de la beletra vivo. Ĝia ĉiumonata aperado certigis senhaltan pulsadon, signifis instigojn kaj impulsojn al verkantaro geografie izolita, kulture disa. Ĝia alta nivelo enhava, lingva kaj stila fiksas normon al kies atingo oni strebu.

Cetere, tio havis sian prezon: ni neniam scios kun plena certeco, kiuj verkoj de kiuj aŭtoroj estis redakcie modifitaj, kaj kiom, de Kalocsay, kiu ne hezitis draste ŝanĝi ricevitaĵojn. Ĉi ties kvalito certe gajnis el lia interveno, sed je la prezo de ia unuecigo.

*Literatura Mondo* absolute ne forfermis sin en ian verdan geton kulturan, kaj tio devus servi kiel konstanta rememorigilo por niaj periodaĵoj. Regule aperis rubrikaj observaj kaj kritikaj pri neesperantaj literaturaĵoj diverslingvaj, kaj eĉ pri fruktoj de aliaj artoj, en akompano de reproduktaĵoj pentraj aŭ statuaj. Kvazaŭ mini-antologioj, aperis “naciaj numeroj”, kiel la ĉeĥa, estona, jugoslava, latva, pola aŭ sveda. Suplementis ekde 1933 *Bibliografia Gazeto*, kaj de 1934 ĝis 1938 la kvaronaraj kajeroj de *Lingvo-Libro*, donanta spacon por apartaj kaj amplekse flegi la recenzarton.

En lerta simbiozo kun la revuo, la

samnoma eldonejo publikigis, bone reklamate sur la paĝoj de la revuo, LM-aŭtorojn debutantajn aŭ jam sukcesajn.

Dum la nuraj kvar jaroj de sia ekzistado, ĝi eldonis sub la sceptron de Bleier 43 verkojn. Sub la marko de LM aperis i.a. ĉiuj tiamaj verkoj de Kalocsay kaj Baghy, la debuta esearo *De paĝo al paĝo* de Tárkony (tiam Totsche), verkoj de Adamson, Emba, Engholm, Fethke/Forge, Ĵurzēns, Lejzerowicz, Newell, Sturmer, Szilágyi, Weinhengst, antologio ĉeĥoslovaka, kaj referencverkoj kiel la *Enciklopedio* aŭ la *Plena Gramatiko*.

Jam Giorgio Silfer kaj aliaj altiradis la atenton al la interesa fenomeno ke LM multilate imitis la hungaran literaturan revuon *Nyugat* (“Okcidento”, 1908-1941), kies redaktoron Mihály Babits Kalocsay “paŝis” eĉ en tio ke ambaŭ tradukis la ĉefverkon *Infero* de Dante. La kultura misio de *Nyugat*, proksimigi la “origine orientan” kulturon hungaran al la kulturaj tradicioj kaj progresaj valoroj de Okcidenta Eŭropo, estis inspira ankaŭ por LM, kun la evidenta diferenco ke por la Esperanta kulturo temis pri kreado komence “ex nihilo” kaj, ĉiam, fare de aŭtoroj el plej diversaj mondopartoj. Cetere, en 2009 aperis sensacia hungarlingva studo de Árpád Rátkai pri la engaĝiĝo de *Nyugat*-aj verkistoj pri Esperanto aŭ/kaj Ido: nun ni havas verajn, solidajn pruvojn ne nur pri la influo de *Nyugat* al *Literatura Mondo*, sed ankaŭ pri tio ke la demando pri internacia lingvo pli ofte kaj pli profunde okupis la pensadon de multaj tiutempaj hungaraj verkistoj ol ĝis nun konsciante.

Kiam la fera kurteno definitive distranĉis Eŭropon, en 1950 LM devis informi siajn abonantojn ke “pro financaj malhelpoj la aperigo de la revuo ne plu estas ebla.” La malhelpoj estis, kiel konate, precipe politikaj. Budapeŝto, unu el la kulturaj ĉefurboj de Esperanto, eksilentis por longe. La verd-flaman torĉon nur kvin jarojn poste transprenis *La Nica Literatura Revuo* kaj *Norda Prismo*.

István Ertl





## Rekoni konataĵoj...

**Nevelsteen, Yves. *Komputeko: Pri-komputila terminokolekto. — Partizanske: Espero, 2008. — 96 p.***

Por mi estas iom tikla afero recenzi komputadan terminaron, ĉar mi mem estas aŭtoro de verko samtema. Mi tamen konsentis recenzi, ĉar mia ĝenerala impresio pri la koncerna verko, *Komputeko*, estas sufiĉe favora.

La vorto *Komputeko* estas konstruita (en maniero eksteresperanta) rememore pri la *PeKoTeKo* de R. Eichholz<sup>1</sup>; verdire, tiu lasta ambiciis kolekti ĉiajn ajn terminojn, ne nur komputadajn; kaj ĝiaj principoj kelkarilate estis rekte kontraŭaj ol tiuj de *Komputeko*. Tamen, iom simile al *PeKoTeKo*, ankaŭ *Komputeko* ekzistas en formo de komputila datumbazo — ĉi-okaze, datumbazo rete disponebla ĉe [www.komputeko.net](http://www.komputeko.net) — kaj la broŝuro prezentas ĝian momentan staton.

### Estiĝo, principoj kaj aranĝo

*Komputeko* estiĝis kiel kompilaĵo el reala uzado en *Monato*, kelkaj traduklistoj de programlingvaj terminoj, *Komputada leksikono* (KompLeks) kaj por-esperantaj adaptajtoj de programaro:

Certe en la dissendolisto de la tradukteamo de OpenOffice.org la konkludoj estas tre interesaj. Estus domaĝe ne disponigi tiujn konkludojn al pli granda rondo.

Kunlaborante al Vikipedio, tradukante interalie la permesilojn de “Creative Commons” kaj provlegante Drupalon, mi kolektis terminojn. Ĉie kie mi trovis listojn kun prikomputilaj vortoj, mi ilin aldonis al la kolekto [p. 5].

La resumo de la diskutoj ampleksas 3 paĝojn (7, 10–11). La resto de la broŝuro konsistas el senkommentaj tradukoj angla-esperantaj.

Supozeble por ne perpleksigi la leganton, la aŭtoro donas po ne pli ol du variantojn de traduko. Plejparte la tradukoj estas atribuitaj, tamen ankaŭ da atribuoj kutime estas ne pli ol du.

En la tradukoj ne ĉiam klaras, ĉu la du alternativoj prezentas samsencajn variantojn aŭ malsamajn signifojn; ekz-e

**autowrap** = aŭtomata linifaldo | aŭtomata teksta ĉirkaŭfluo

**feedback** = prijuĝaj rimarkoj | retrokoplado

**hack** (v) = kodumi | kodrompi

(malsamaj signifoj)

1. Eichholz R. *Per-komputora terminokolekto (Pekoteko)*. Plena Pekoteko 85–90. Vol. 1—3. Bailieboro: Esperanto Press, 1992.

**CD-recorder** = KD-registrilo | k-diska registrilo

**accuracy** = ekzakto | ekzakteco (sinonimoj)

Tiamaniere la aŭtoro

... kolektis tiel ĉi jam pli ol 7500 tradukojn al Esperanto. Temas verŝajne pri la plej granda kaj (pli grave) plej ĝisdata kolekto de tiaj terminoj en Esperanto [p. 5].

### Atribuoj

La fontindikoj havas gravan rolon en leksikografia laboro: ili helpas kompreni, kiom tradicia kaj rekomendinda estas koncerna vortuzo, kiom ĝenerale ĝi estas akceptita kaj de kiuj aŭtoroj. Manke de difinoj (kiel en *Komputeko*) fontindiko povas provizi ian kuntekston, surbaze de kiu oni povas diveni, pri kiu el pluraj eventualaj signifoj temas.

Unu komprenebla principo estas indiki kiel eble plej kompletan referencaron; tiel oni plej klare vidas, kiom ĝenerala estas la konateco kaj akcepto de la termino. Sed tro longaj fontindikaj listoj estas ankaŭ iom embarasaj kaj malhelpas rapidan konsultadon.

Por malgrandigi tiun embarason oni povas elekti mallongajn referencilojn eksterliniajn; tiel en *KompLeks* mi uzis la suprajn indicojn en “ŝarg*o*:i<sup>kjp</sup>” por indiki ke la radiko estas Fundamenta (°), ke tiasence ĝin uzis la terminaroj de Kalkhoff k.a. (k), de P. Jelenc (J), de D. Pfeiffer (p). Por komparo, *Komputeko* la koncernen terminon atribuas jene:

**load (register, program)** (v) = ŝargi (ReVo, OOo)

Malfacilas diveni, kiun elektoprincipon aplikis la kompilinto de *Komputeko*.

Unuflanke, malsimile ol la tradiciaj vortaroj, kiuj kutime indikas la plej fruan aperon, *Komputeko* tre ofte preferas la plej freŝajn el la plej aŭtoritataj (por la kompilinto). Tio havas sian avantaĝon — se oni ial devas limigi la fontindikojn, ja vere gravas, ĉu la vorto plu restas uzata (precipe se oni same taksas la aŭtoritatojn); sed tio ankaŭ limigas la valoron de tiaj fontindikoj (la elekto ja dependas je la juĝo de la kompilinto). Tamen aliflanke, la malnova *Bertin* (1985) tre ofte eklipsas tute freŝajn fontojn.

Arbitreco de la atribuoj iam kreas misprezentojn. Ekz-e

**ajust** (v) = ĝustigi (Bertin) | akomodi (KompLeks)

Nu, en *KompLeks* “akomodi” estas menciita por kompleteco, kaj estas difinita per plusendo al “agordi” kaj “ĝustigo”. Sed la leganto de *Komputeko* en pluraj tiaj okazoj konkludos (erare!), ke

*KompLeks* rekomendas termininformon kiun ĝi fakte malpreferas.

En la reta versio oni povus vidigi la atribuojn laŭmende (ekz-e kiam la muskursoro ŝvebas super la termino); sed fakte la reta versio ne profitas tian eblon. En la reta versio la sigloj estas kolektitaj sur aparta retpaĝo, donanta TTT-adresojn de la koncernaj dokumentoj (iuj adresoj jam estas malvivaj). Plenvaloraj bibliografiaj referencoj mankas. Tio estas ankoraŭ pli sentebla en la papera versio, kiu eĉ tiajn URL-ojn ne disponigas.

### Sencoj kaj vortoj

*Komputeko* havas la formon de tradukvortaro angla-esperanta. La avantaĝo de tia formo *ŝajnas* evidenta: oni ne bezonas kompreni. Ne hazarde multaj terminoj, unue enkondukitaj en la sencodifina *KompLeks*, kaj poste transprenitaj de la traduktiva *Teknika vortaro angla-pola-Esperanto* aperas en *Komputeko* kun la atribuo *TekVort*.

Tamen konstrui terminaron surbaze de traduktiva vortaro estas iom danĝera: tradukante *vortojn* oni ofte perdas *sencojn*. Facilas traduki *secretary* per *sekretario*; sed oni riskas ne rimarki, ke *mia sekretario* havas nenion komunan kun la *Ĝenerala Sekretario*. La tradukvortaro trudas nelogikajn paŭsaĵojn, kiel *malvarmsanga* por la senco *trankvila*, kiajn logike konstruita lingvo devus eviti.

Komence Esperanto havis nur tradukvortarojn, kaj tiaj paŭsaĵoj ne maloftas en la lingvo. Ili eĉ oportunas kiam oni tradukas en lingvon sammaniere mallogikan sen kompreni la tradukatan materialon (en mia junaĝo mi iom praktikis samtempan buŝtradukadon, kaj povis aprezi tiajn komunaĵojn). Aliflanke, kiom tiaĵoj helpas la tradukiston, samtiom ili malfaciligas la komprenon por la adresatoj, kiuj ja *bezonas kompreni*.

Tamen ankaŭ dekomence Esperanto posedis sanan skemisman tendencon. Oni ja klare distingis inter *malnova* kaj *maljuna*, malgraŭ la difekto de pliopo de la lingvoj eŭropaj. Verdire, la inerciuloj provas trudi al Esperanto la difekton de sia lingvo per *olda* ktp; tio simpligus tradukon en lingvojn konfuzajn — sed samgrade malfaciligus tradukon en lingvojn kiuj tiun difekton ne havas (ekz-e en la uzbekan).

Precipe danĝera ĉi-rilate estas la angla lingvo. Oni ofte admiras ĝian koncizon; kaj eksterdube ĝi posedas la plej kompletan terminaron por komputado. Tamen tio ne malhelpas, ke la anglaj terminaroj estas pli ol averaĝe konfuzaj kaj

malsistemaj; sian faman koncizon la angla ŝuldas, interalie, al abunda uzado de metonimioj, kio faras multajn terminojn nekomprenblaj ekster specifa situacio.

La angla terminaro estas iom simila al la Interreto: same ĥaosa kaj same kompleta. Ekzistas bibliotekoj el verkoj bonkvalitaj, fidindaj kaj zorge elektitaj; sed bedaŭrinde, ili ne estas tiom kompletaj kiel la Interreta rubujo.

Jen ekzempla artikolo el *Komputeke*:  
**core** (s) = kerno (Bertin, Drupalo)

Dum pluraj jardekoj *core* estis metonimie uzata por *ĉefmemoro*, kiun en la frua periodo oni fabrikis el magnetaj ringetoj feritaj (*magnetic core*, *ferrite core*). La ferita memoro ne plu ekzistas, sed en ŝelprogramoj de Unikso kaj eĉ en paneaj mesaĝoj de Vindozo oni ankoraŭ parolas pri *core\_size* aŭ *dumping the core*.

Krom ĉi tiu signifo metonimia, *core* ĉiam havis sencon metaforan (kerno de programosistemo); kaj lastatempe ĝi akiris novan sencon aparataran: nun ĝi metonimie aludas ne memoron, sed ties kontraŭon, procesoron (*dual core computation* — komputado per *dukerna* procesoro).

Unu el la bazaj konceptoj de programado estas uzado de variabloj kaj havigo de valoro al variablo; en KompLeks mi nomis tion *valorizo*; la koncernaj anglaj terminoj estas *to assign*, *assignment*. Nu, *Komputeke* entenas:

**assign** (v) = atribui (OOo) | asigni (PIV2002)

**assigned configuration** (s) = atribuita agordo | asignita agordo

**assigned task** (s) = atribuita tasko | asignita tasko

**assignment** (s) = atribuo (KompBaz) | asigno (Bertin)

**assignment statement** (s) = atribua instrukcio

La radiko *assign...* havas en tiuj terminoj malsamajn signifojn. Mi tuj notu, ke PIV2002 donas al *asigni* tute alian sencon — tiun de disponigo (*allocation*) — por kiu, cetere, *Komputeke* indikas

**allocation** (s) = atribuo (Bertin)

Ekster kunteksto maleblas diri, kion celas *assigned task* — ĉu temas pri taskoj (procezoj) operaciumaj? Aŭ pri homa tasko en IBM-stila administrado de programprojekto? En la lasta okazo pli konvenus “tasko komisiita”. *Assignment statement* estas nemiskomprenbla en la angla lingvo (temas pri valorizo) — sed esperantisto kiu lernis ke “atribuo” estas *allocation* probable vidos en “atribua instrukcio” memorgenerilon.



La signifo de plurvorta angla termino ofte ne estas reduktebla al sumo de ĝiaj partoj. La simpleco de tradukvortaro estas trompa kaj erariga. Por ĝuste traduki *assigned* aŭ *core* necesas konsideri iom da kunteksto.

### Kohero

Alia problemo kiun kaŝas la tradukforma aranĝo estas la kohero de la esperanta terminaro. En la aranĝo laŭ la anglaj kapvortoj oni ne vidas, ke *kerno* respondas ne nur al *core*, sed ankaŭ al *kernel* kaj *nucleus*. Simile,

**current** aktuala (dosierujo, rikordo ktp)

Tio malkoheras kun *aktualigi*, indikita por tute alispeca *update*. Fakte, en Esperanto la vorto *kuranta* ja havas la metaforajn sencojn de la angla *current* (kuranta monato, kuranta afero ktp); se oni volas raciigi ĉi tiun sencon, oni povus pli logike diri *la nuna dosierujo*, *valoro* ktp; tio estas pli trafa ol *aktuala*, ĉar nemalofte *la nuna* objekto jam estas *neaktuala* (ne plu interesa), kaj tial oni transiras al objekto “pli aktuala” (ekz-e ŝanĝas la laborodosierujon).

Inverse, malsamaj anglaj vortoj povas priskribi unu saman nocion. *Directory* kaj *folder* egale estas *dosierujo*. Prave. Tamen *Komputeke* ne rimarkas, ke *structure* en C estas esence la sama datumtipo, kiel la Paskala *record*.

Alia amuza ekzemplo koncernas la vorton *wrap*:

**autowrap** (s) = aŭtomata linifaldado (Maŭro) | aŭtomata teksta ĉirkaŭfluo  
**text wrap** (s) = teksta ĉirkaŭfluo (OOo)

**word wrap** (s) = linifaldo (KompLeks, ReVo) | aŭtomata liniosalto (Pekoteko)

**wrap off** (s) = sen ĉirkaŭfluo (OOo)

Temas pri du parencaj, tamen ja malsamaj aferoj. “Linifaldo” estas multe pli ofta; “teksta ĉirkaŭfluo” (de bildo ktp) estas pli speciala, kaj ĝia esperanta traduko paŭsas pli klaran, pli internacian kaj pli bonan terminon “text run-around” (samkiel la rusa “обтекание”), kiun *Komputeke* ne konas; la tradukoj por la du nocioj aperas jen dise, jen kune, kva-zaŭ variantoj de unu sama termino.

Ni jam vidis malkoheron en la terminoj por *valorizo*. La ĉefa objekto kontraŭ la nemiskomprenbla formo *valorizo* estas la uzo de la neoficiala sufikso *-iz*. En pluraj okazoj *Komputeke* senprobleme akceptas tiajn sufiksojn: *distingivo* (resolution), *traigivo* (throughput); eĉ *nulizi* (to zero), speciale interesa, ĉar temas pri havigo de la valoro *nul* — do, pri speciala okazo de *valorizo*. Eĉ pli amuze, la havigon de la komenca valoro *Komputeke* tradukas ...

**initialize** (v) = pravalorizi (KompLeks, OOo)

### Eraroj

Sur la malantaŭa kovrilo mi legis, ke *Komputeke* “estas konsilata referencverko de interalie la Terminologia EsperantoCentro, la administra redakcio de *Monato*, la Akademio de Esperanto kaj la estraro de E@L”. Mi ne povas kontroli ĉiujn ĉi tiujn asertojn, tamen almenaŭ la Akademio faris nenian rekomendon pri *Komputeke*; ĝi neniam ekzamenis la verkon, kaj mi dubas ke pri ĉi tiu entute iam temis en la akademia laboro.

**e-book** retlibro

Ne temas pri reta libro, temas pri libro enkomputila, kian oni povas legi ankaŭ (kaj eĉ precipe) sen retkonekto. En *KompLeks* mi provis uzi la radikon *bit* (perbita, bitigita) por esprimi la funkcion de la angla *e-* (electronic, digital): *bitlibro* ktp; eble ne tre sukcese; tamen retlibro ja nepre malkonvenas por la celata senco.

**integrated circuit** (s) = integrita cirkvito (KompLeks, ReVo)

Fakte kaj en *KompLeks*, kaj en *ReVo* aperas *integra cirkvito*. Tio konformas al la adjektiva senco de la radiko *integr-* (kia ĝi estas en PIV1); la ĝusta partecipa formo do estus *integrigita*. Tamen ŝajnas al mi, ke ne temas pri integrigo de disaj pecoj en unu cirkviton — la cirkviton oni fabrikas kune kun la komponantoj. *Integrigita* estas pli proksima al la angla originalo — tamen la originalo mem ŝajnas al mi malnecese fuŝa: oni ja ne diras, ke bebo naskiĝas kun *integrigita stomako* — la



organismo estas *integra*, ne *integrita*. Do, malpli longa termino estas ankaŭ pli trafa, kaj evitas la demandon pri la leksika kategorio de la radiko *integr-*.

PIV2002 krokodile faris la radikon *integr-* transitive verba, kaj sekve ebligis la formon *integrita*. Ĉe tio, tute malkohere, PIV2002 lasis al la adjektivo *integra* ĝian antaŭan sencon laŭ PIV1. Nu, ĉi tie ne temas pri la fuŝoj de PIV2002; kvankam menciindas, ke eĉ en PIV2002 la termino estas *integra cirkvito* (sub *cirkvito*).

## Konkludo

Tradukvortara maniero priskribi terminaron (aŭ ĝenerale la leksikon) konvenas en du situacioj:

1. La priskribata lingvo estas tiom subevoluinta aŭ tiom malmulte sciata, ke ĝiaj propraj rimedoj ne sufiĉas por mempriskribi; aŭ

2. La priskribata leksiko estas sufiĉe firme establita, kaj povas elteni la neeviteble malprecizan difinon per fremdlingvaj tradukoj.

Ekzemplon pri la unua situacio prezentas la Universala Vortaro (parto de la Fundamento de Esperanto); *Komputeko* estas ekzemplo pri la situacio dua.

Uzi *Komputekon* oni povas nur se oni jam bone scias la kernajn nociojn: ĝi nek instruas nek helpas kompreni, ĝi helpas rekoni konataĵon.

La taskon “fidine rekoni” povus helpi elekto de precizaj kaj nemiskompreneblaj terminoj anglalingvaj — ja ankaŭ tiaj ekzistas, eĉ se ili ne estas la plej ofte uzataj; kaj la artikoloj por la pli oftaj misterterminoj konsistis el plusendoj al la pli klaraj terminoj anglaj. Ekz-e:

**text runaround** (s) = teksta ĉirkaŭfluo

**word wrap** (s) = linifaldo (Kompleks, ReVo) | aŭtomata liniosalto (Pekoteko)

**wrap** (s) — vd “text runaround”; “word wrap”

Tio estus kromlaboro: kompilante vortaron de esperanta leksiko, oni devus konstrui tezaŭron de terminaro angla; tio estus la prezo de manko de difinoj esperantlingvaj. Kaj por ke tio estu vere valora, oni ja iam bezonus indiki po pli ol du precizigojn.

Unu difekto de la tradukbaza prezento de la terminaro estas principa: ĝi ĉiam restos paŭsaĵo de la angla pensmaniero, liberan pensmanieron esperantecan ĝi paralizas. Tradukvortaro angla-esperanta ne havos artikolon pri la nocio *skribilo* — ĉar tian ĝeneralan vorton la naciolingvo simple malhavas.

Sergio Pokrovskij

# Literatura konkurso



**La Ondo de Esperanto** denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro-2009*. Ĉi-jare la organizanto proponas tri originalajn branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio
3. Recenzo de la romano *Serpentoj en la puto* de István Nemere (Kaliningrado: Sezonoj, 2009).

En la 1a kaj 2a branĉoj oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj, en la 3a branĉo — nur per unu verko.

Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ la 1a de decembro 2009.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso [sezonoj@yahoo.com](mailto:sezonoj@yahoo.com). Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La organizanto ĝis la 1a de januaro 2012 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

**Sukcesojn!**

Halina Gorecka

## Premio Onisaburo Deguchi 2009

En la fermo de la Bjalistoka UK, *Vinilkosmo* — eldonejo starigita de EUROKKA — ricevis la Premion Onisaburo Deguchi 2009, nomatan ankaŭ la “esperantista pacpremio”, ĉar ĝin oni donas pro agado, kiu antaŭenigas internacian amikecon kaj pacon.

*Vinilkosmo* kontribuas al tio per muzikaj rimedoj — tiel rezonis la estraro de UEA.

La premio konsistas el diplomo, kiun transprenis en Bjalistoko Jeanne-Marie Cash (*vidu sur la apuda foto*) por transdoni ĝin al la respondeculo de *Vinilkosmo* kaj EUROKKA en Donneville (suda Francio/Okcitanio). Krome, la premio konsistas el la sumo de 2000 eŭroj kiujn *Vinilkosmo* dediĉos por financi novan projekton de albumo de Esperanto-artisto kaj, tra EUROKKA, por financi Esperanto-artistan programadon kadre de turneo aŭ kultura aranĝo aŭ festivalo en la venontaj monatoj.

La tuta teamo de *Vinilkosmo*/EUROKKA dankegas la UEA-estraron pro la atribuo de la premio kaj akceptas kun granda plezuro kaj honoro tiun premion kiel agnoskon de la 21-jara Esperanto-muzika agado kiu strebas kontribui al paco kaj interkompreniĝo en la mondo per Esperanto-muzika kulturo.



Floréal Martorell



## La festa FESTO

En la antaŭa *Ondo* vi povis legi pri la kulturriĉega Esperanto-somero en Eŭropo: KEF, IJK, UK, FREŜO... Nun ni reiru al la festivalo FESTO okazinta en la germana regiono Hesse, en la bela vilaĝo, Zwingenberg 8–15 aŭg 2009.

Tuj post la interkona vespero malfermis la festivalon Stefo el Berlino. Sola, akompanante sin per elektroakustika gitaro, li prezentis sian popfolkan kaj folkrokan repertuaron en du partoj. Lia elstara voĉo perfekte eldiras la bone verkitajn tekstojn. Ĉi tiu voĉo meritis pli multinstrumentan akompanon, eĉ de tuta bando... Ĉu Stefo iĝos la Esperanta bobdilano? Kiu scias... Li certe havas potencialon:

<http://www.ipernity.com/home/stefo>, <http://www.ipernity.com/blog/39007/178260>, <http://www.myspace.com/stefichjo>

La dua tago estis la tago de Gijom, kiu gvidis poeziajn ludojn matene kaj vespere prezentis sin sursceneje por pianokanta recitalo. La kantoj de ĉi tiu Pariza artisto estas plejparte eltiritaj el franca repertuaro adaptita al Esperanto.

<http://www.ipernity.com/home/lilioakvo>

Post la koncerto de Gijom alvenis la karaokea vespero. Tiu programero iĝas grava elemento de FESTO kaj Eli el Munkeno gvidis ĝin.

La tria tago estis streĉa pro la rok-koncerto... La koncertejo en la kelo de la junulargastejo estis sufiĉe malgranda, kaj jam ekde la sonprovado posttagmeze la tuta domo reeĥis la viglan laŭtegan drumsonon de la du bandoj ekzercantaj...

La unua koncertis la germana bando *Alles Franziska* el Darmstadt, kiu konsentis ludi antaŭ la brazila bando *Supernova*. Ili kantis germane, kaj laŭ tiuj kiuj komprenis la germanan, ilia tekstoj estis interesaj kaj humuraj. Vi povas rete

malkovri ilian muzikon ĉe [www.myspace.com/allesfranziska](http://www.myspace.com/allesfranziska).

Ekde la unuaj notoj de *Supernova* la etoso kaj sonpremo superlaŭtiĝis. La stilo de *Supernova* sursceneje metaliĝas kaj eligas potencegan sonon kiun batege diktas la drumisto Romulo. Rogener basgitaro apogas la drumbatojn, kaj Leandro gitare melodiumas laŭ elektra metala gitarsono. La voĉo de Rogener foje raŭka, foje pli fajna kun subteno de la korusaj voĉoj de Roĝer Borĝes kaj de Leandro kantas la jam famajn kantojn de ilia disko. Sed estis ankaŭ kelkaj surprizoj.

Maloftege okazas tiaspecaj pezrokaj koncertoj en Esperantio, kaj la publiko ensorbiĝis en la laŭtega sono por varme kaj mojose skuiĝi balancigante antaŭen la kapojn laŭ tia metalroka dankestilo, en Esperantio mi spertis tion nur kun *Krio de Morto!* Tiuj, kiuj eltenis, daŭrigis dancante en la diskoteka nokto kun Roĝer Borĝes.

La mardan posttagmezon estis la danckurso kun la bando *Kapriol'*, kiu instruis balfolkajn dancojn. Vespere, pro neveno de Zuzanna Kornicka, la organizantoj proponis kantojn el la repertuaro de *Kajto* en plenumo de Marita kaj Marian de *Kajto* kaj de *Kapriol'*. Ili kunkantigis kaj dancigis la publikon.

Sekvavespere, post tuttaga ekskurso en Frankfurto, *Kapriol'* prezentis sian balfolkan repertuaron etosige dancigante la partoprenantojn. Verŝajne *Kapriol'* vekos intereson ĉe esperantistoj pri tiu kreskanta dancmovado.

Ĵaŭdo estis la Hiphopa tago. Posttagmeze prelegis Platano pri hiphopo, kaj Tone faris kurson pri kapuera kaj hiphopa danco... Vespere startis hiphopaj spektakloj kun komuna DĴ Leo por la diversaj repistoj: unue Platano de *La Pafklik*, kiu kantis kun Tone kaj Emmanuel de *Azaŭak*. *La Pafklik* ne povis



plene koncerti ĉar Katakana foriris al Islando. Emmanuel mirige bone elturniĝis, kvankam la stilo en *Azaŭak* estas tute alia. Poste surscenejiĝis Tone por propra koncerto, kaj denove li sukcesis krei aparte bonegan varman etoson, kundancigante ĉiujn...

La lasta vespero ekis per videokoncerto de *Inicialoj DC* el Frankfurto, bonkvalita kiel kutime... eĉ kun novaj kantoj: <http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/135504>

Kaj tuj post ilia koncerto ekis la speciala koncerto... Surpriza koncerto. Reveno de la VVĈPoj! La ne maltrafeblaj, la skandalemaj, la ofendemaj, la diboĉemaj *VerdVarmĈiliPiproj!!!*



Jarojn post sia skandala apero en IS ili revenis multe pli maljunaj kaj malsanaj (kanabo, alkoholo kaj aliaĵoj helpis ilin pli rapide fekmaljuniĝi kaj detruigi), sed sufiĉe viglaj por plenumi la koncerton kaj fini ĝin preskaŭ tute nudaj, nur kun ŝtrumpetoj!.. La germaneca sekureca servo de la koncertejo devis interveni kaj forĵeti ilin de la scenejo pro la "ofenda enhavo". La reveno do estis tiom kaosa kiom la debuto.

Necesis purigi la scenejon post la Piproj, antaŭ la daŭrigo de la Internacia Vespero, en kiu partoprenis Gianmarko Cantore kun la magnetonda instrumento Moog, akordionistoj Fabien kaj Quentin, Bimbao (Tone kaj Maxime), diĝiriduo (Hannes), pianokantado (Johanes) k.a. Post la Internacia Vespero estis la oficiala fermo de FESTO kaj la nokto finiĝis per diskoteko plenumita de DĴ Leo...

Vera festeca etoso dum la tuta semajno! Jen sukcesa aranĝo, kaj ĉiuj partoprenantoj estis kontentaj kaj certe emos reveni venontan jaron .. do memoru: FESTO! FESTO!! FESTO!!!

Legu, vidu kaj aŭdu pli:

<http://www.ipernity.com/group/festo>, <http://www.ipernity.com/doc/25645/album/122408>, <http://www.ipernity.com/doc/vinilkosmo/album/75226>

Muziksomerumis  
**Flo!**





## Beletro Almanako, 2009, №5

La plej grandan parton de la kvina *Beletro Almanako* okupas eseoj. Abel Montagut artikolas pri Jules Verne kaj Esperanto. La elirpunkto estas la lasta nefinita romano de Verne *Esplorvojaĝo*, eldonita unuafoje nur en 1993.

Du eseoj de Zofia Banet-Fornalowa estas interligitaj: *De la morto al la senmorteco* priskribas la cirkonstan-

cojn, en kiuj okazis prezentado de *Poŝtoficejo* de Tagor en la Varsovia geto. Kaj la dua skize traktas la rilaton de Korczak al la hinda religi-filozofia heredaĵo. La teatraĵo mem de Tagor (re)aperas, la Esperantan tradukon de Provat Ghose el la jaro 1937 Probal Daŝgupto modere fideligis al la originalo.

Proza fako entenas novelojn *Barata Kafejo*, *Novjorko* de Ulrich Becker kaj *Pionira gvidanto* de German Sadulajev (tradukis el la rusa Kalle Kniivilä). István Ertl tradukis el la hungara du tekstojn de István Kemény: *Savi la tempon* kaj *Nekonata Budapeŝta Majstro: Nekonataj budapeŝtaj majstroj*.

Originala poezio ĉeestas per du eroj de Baldur Ragnarsson. La tradukita poezio montras specimenojn el Theodorus Beza (Gerrit Berveling el la latina), Mihai Eminescu (el la rumana Ionel Oneț), István Kemény (el la hungara István Ertl). Abel Montagut, Antonio Valén kaj Jorge Camacho prezentas sortimenton da poemoj de la prestiĝa kataluna poeto Joan Margarit, verkanta en la kataluna kaj en la hispana. Kompletige aperas lia artikolo pri lia verkado dulingva.

Impona recenza rubriko prezentas dek sep librojn. Krom du esceptoj, temas pri la novaj eldonaĵoj de la jaroj 2007–2009.

La almanakon ornamas fotoj de Ana Parrilla Nadal.

Halina Gorecka

## Ricevitaj libroj

Dobrzyński, Roman. *Bona Espero: idealo kaj realo*. Verkita laŭ interparoloj kun Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia. — Martin: Stano Marček, 2008. — 256 p., il. — [Recenzoekzemplero].

*Dua bulteno*: 94-a Universala Kongreso de Esperanto. Bjalistoko, 25 julio – 1 aŭgusto 2009. — [Rotterdam]: [UEA], [2009]. — 32 p., il. — [Donaco de Aleksej Korĵenkov].

Eco, Umberto. *La serĉado de la perfekta lingvo en la Eŭropa kulturo* / Tradukis el la itala Daniele Mistretta; Antaŭparolo de Humphrey Tonkin. — Pisa: Edistudio, 1996. — 319 p., il. — [Donaco de Luis Lazaro].

Korĵenkov, Aleksander. *Homarano*: La vivo, verkoj kaj ideoj de d-ro L. L. Zamenhof. — Kaliningrado: Sezonoj; Kaunas: Litova Esperanto-Asocio, 2009. — 320 p.; 400 ekz. — (Serio *Scio*; №8). — [Donaco de Sezonoj].

Laurinčiukas, Albertas. *Tigro — ĝia vivo kaj morto*: Vojaĝaj rakontoj / Tradukis el la litova Telesforas Lukoŝevičius. Panevėžys: Panevėžio spaustuvė, 2008. — 78 p.; il. — [Donaco de Telesforas Lukoŝevičius].

Maistre, Xavier de. *Vojaĝo ĉirkaŭ mia ĉambro* / Tradukis el la franca Gonçalo Neves. — Chapecó: Fonto, 2008. — 72 p. — [Recenzoekzemplero].

Nevelsteen, Yves. *Komputeko: Prikomputila terminkolekto*. — Partizánske: Espero, 2008. — 96 p., 500 ekz. — [Recenzoekzemplero].

Ивасенко, Анатолий. *Занимательная лексикология международного языка Эсперанто*. Словари: синонимов, омонимов, паронимов. Мнемонический словарь. — Краснодар: Тамзи, [2009]. — 72 с.; 100 экз. — [Donaco de Anatolij Ivaskenko].

## Ricevitaj gazetoj

Beletro Almanako, 2009/5; Esperanta Finnlando, 2009/4; Esperanto en Azio, 2009/64; Esperanto, 2009/9; Espero Katolika, 2009/1-3; Kontakto, 2009/2,3; La KancerKliniko, 2009/131; La Movado, 2009/702; La Ondo de Esperanto, 2009/8-9; La Revuo Orienta, 2009/7; Literatura Foiro, 2009/240; Lumo, 2009/1; Mikrofono, 2009/26; REGo, 2009/4; Scottish Esperanto Bulletin, 2009/2; Svisa Esperanto-Societo Informas, 2009/3; Usona Esperantisto, 2009/4.

## Literatura Foiro, 2009, №240

Pli svisa ol kutime estas la lasta numero de *Literatura Foiro* (№240, aŭgusto 2009), sur la ondo de la aligo de Ĉaŭdefono (kaj Loklo) al la monda kultura heredaĵo, laŭ freŝa decido de Unesko.

Jen do, kadre de la celebulo de la 150a datreveno de Lazaro Ludoviko Zamenhof, eseo de Andreas Künzli pri la rilato inter Svislando kaj la kreinto de esperanto. La oracio de Perla Martinelli honore al Gaston Waringhien, okaze de la inaŭguro de la Esperanta Panteono en Ĉaŭdefono. Omaĝo de Giorgio Silfer al Henry Dunant: lia *Rememoro pri Solferino* ekzistis en esperanto jam en la jaro 1906.

La iama prezidanto de PEN Internacia, György Konrád, estas la honora gasto, per sia eseo pri *La romano kaj la urbo*. La reĝisoro kaj aktoro Jordan Slavejkov debutas kiel redakciano per sia artikolo pri Michael Jackson, kiu interalie utiligis esperanton en reklama vidbendo de 1994.

Kino iras al la luno... “2001: odiseado en la spaco” estas ree spektita de Giorgio Silfer, kun analizo pri la futurologio de 1969: jaro grava ankaŭ por Esperantio, kies literaturan kaj socian historion enfokusigas ankaŭ aliaj artikoloj, kiel la recenzo de Bertil Nilsson pri admirinda verko de Carlo Minnaja.

LF donas spacon ankaŭ al novaj verkoj, interalie al poetoj kiel Etel Zavadlav kaj Jaroslav Krolupper. Kaj agrablaj revenoj estas Leen Deij per sociologia artikolo, kaj Zlatoje Martinov pri la esperanta tradukarto.

La revuon posedas, eldonas, administras LF-koop. Ĉefredatoro: Ljubomir Trifončovski. Provekzemplero estas petebla ĉe [lf-koop@esperantio.net](mailto:lf-koop@esperantio.net).

HeKo

**Monato**  
INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

**Sendependa internacia  
revuo en Esperanto kun  
legantoj en 65 landoj!**

■ Politiko ■ Komputado ■ Scienco  
■ Moderna vivo ■ Hobio ■ Sporto

[www.monato.net](http://www.monato.net)

Flandra Esperanto-Ligo  
Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen  
[monato@fel.esperanto.be](mailto:monato@fel.esperanto.be)

**A**l la julia tasko *El taglibro de iu virino* venis nur sep respondoj. Ilin sendis Edmund Grimley Evans (Britio), Bruno Lehtinen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Karl Heinz Schaeffer (Germanio), Dorota Burchardt, Hanna Skalska (Pollando), Jurij Kivajev (Ruslando). La respondoj estas diversgrade kompletaj (eĉ pli ol la aŭtorino celis). Jurij Kivajev konsilis pli bonan varianton: “El mia buduaro vid-eblas lito apud la fenestro”, anstataŭ “En mia buduaro...”

La troveblaj librotitoloj estas jenaj: *La familio* (Bakin), *Bofilino* (Karaslavov), *Sinjoro Tadeo* (Mickiewicz), *La ŝtona urbo* (Löwenstein), *Durankulak* (Ståhlberg), *La monto* (Nemere), *El mia buduaro* (Urbanová), *Lito apud la fenestro* (Salt), *Somermeze* (Kuusberg).

La libropremio iras al **Edmund Grimley Evans**, kiu krome eltrovis la novelartitolon *Ili* de L. Bergiers (eldonis SAT en 1930). Li proponas ankaŭ du titolojn de KD-oj: *Sen* (Persone) kaj *Mi estas* (Jacques Le Puil). Ni gratulas lin!

## Sudoku


4	9						1	
	8				2	5		
1		5					6	
7			6	4				
5			7		3			8
				2	1			4
		8				3		1
		1	9				7	
	7						2	5

Sudoku estas japana enigmo populara en la tuta mondo. Necesas plenigi la kampon per ciferoj de 1 ĝis 9 tiel, ke en ĉiu horizontala kaj vertikala linio kaj en la kvadratoj 3×3 la nombroj ne ripetiĝu.

La respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 10a de novembro 2009.

Komputile kompilis **Aleksej Korĵenkov**

Ŝajnas, ke ne estas kompleta la listo de la kongresaj “vandalaĵoj” en Bjalistoko, kiun aperigis iu ret-gazeto. Dorota Burchardt sendis al ni foton de ŝildo el la nova Zamenhof-Centro. Vandalo (nepre esperantista fundamentano) atakis la literon “j”, sed forgesis meti la ĉapelon super la “s”.



## Spritaĵaj splitoj kaj preskeraroj

*el la kolekto de reduktoro*

### Supozebla prezidanto

... en la aprila kajero de *La Ondo* <...> oni povas legi <...> [i]ntervjuon kun la prezidanto de UEA, Probabl Dasgupta.... ([http://groups.yahoo.com/group/La\\_Balta\\_Ondo/message/1105](http://groups.yahoo.com/group/La_Balta_Ondo/message/1105), 3 apr 2009; senkompatis Valentin Melnikov)

### Fi-ghiera?

Koncerne la suban komunikon de s-ro G. C. Fighiera, “veterano kaj Horora Membro de UEA”... (Ángel Arquillos, [http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto\\_madrive](http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madrive), 10 aŭg 2009)

### Skuaĵaj sonĝoj

Mi estus kontenta, se ĉirkaŭ UEA ekestus unu tia inform-tremo. Sed revii estas facile. (Renato Corsetti, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/14184>, 26 jun 2009; rimarkis Kalle Kniivilä)

### Feministoj sen limoj

La ĉeftemon “Humura literaturo en esperanto” pritraktos kelkaj prelegantoj, el kiuj nur unu (Jacques Le Puil) prelegos eĉ tri fojojn: fakte preskaŭ ĉiumatene, ĉar kiam ne parolos li, parolos lia edzino. (HeKo 397 1-A, 19 jul 2009, <http://esperantio.net/index.php?id=931>; rimarkis Jorge Camacho, aŭ se ne rimarkis li, rimarkis lia edzino)

### Ĉu rigardi propran prismon?

Vi trovas la temon de la monaton ĉe <http://www.lingvo.info/forumo/?lingvo=eo>. Cornelia Blome, Redaktorino de *Lingva Prismo*. (*EAB Update*, 2007, №36, p. 15; trovis Geofrey King)

### Daŭre kaŭre, aŭ: la frustra flustro

Baldaŭ eniris s-ro Inao, kiu tuj kaŭrante sur lian oreleon flustris sekrete. (Masayuki Kuroda. *Animo drivas*. JELK, Oosaka, 1990, p. 47.)

### Ĉu en mortotukon?..

... la Praga Manifesto ŝajnas io tro politike envolvita. (Renato Corsetti, 10 okt. 2008, <http://groups.yahoo.com/group/uea-membroj/message/11859>)

### Ĉu kun fera mano?

La <...> Interlingvistikaj <...> Studoj donas bonan ebl-econ kleriĝi pri interlingvistiko kaj parencaj disciplinoj. (Detlev Blanke. *Simpozio jubilea — ĉu revivigo de polaj tradicioj?* // *Esperanto*, 2008, №11, p. 221)

### Atmosfera nedifinebla!

La impresoj estis ke la partoprenantoj kontentis pri la kongreso kaj ŝatis ian etoson. (*La Espero*, 2009, №3, p. 3; trovis Ionel Oneț)

Plukis István Ertl

*Ĉu vi kaj via klubo prepariĝas al la 15a de decembro 2009?*



## Perantoj de “La Ondo de Esperanto”

**Argentino:** Roberto Sartor, Saenz Peña 3912, B° La Capilla – 52, CP 5507 – Vistalba, Luján de Cuyo – Mendoza

**Aŭstrio:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, BR-70393-900 Brasília-DF

**Britio:** EAB/Viv O’Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, “Nadejda” V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** HEA, Pf. 193, HU-1368 Budapest  
KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tôkyô-tô, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

**Pollando:** PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

**Portugaliao:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



**Pollando.** En la solena fermo de la Bjalistoka UK la scenejon de la ĉeftendego Zamenhof inundis partoprenantoj kaj gvidantoj de la Internacia Infana Kongreseto (vd. p. 7). Ili ricevis multajn aplaŭdojn, pro sia artprogramo, kiun ili preparis dum la semajna provludado en Supraśl. (Bert Schumann)



**Koreio.** Korea Fremdlingva Universitato, Universitato Dankook kaj Universitato Wonkwang oficiale akceptis Esperanton kiel lern-objekton. En septembro sume 354 gestudentoj aliĝis al Esperanto-kursoj en ĉi tiuj universitatoj. Sur la foto estas leciono de Esperanto en la Universitato Dankook. (Lee Jung-kee)



**Kroatio.** La tradicia MIRO estas M...a Internacia Renkontiĝo, la “M” de la unua vorto ĉiujare estas malsama. Ĉi-jare MIRO (vd. p. 8) en Ĉakovec (Kroatio) estis *Mojosa*; ĉi tiu junularslanga vorto estas mallongigo de moderna-juna-stila, la Esperanta ekvivalento de *cool*. (Krunoslav Puškar)





Post dek unu sukcesaj konkursoj (1998–2008) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la 12a Internacia Fotokonkurso. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2009.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2010.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2010.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2010.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Infanoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2011 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-rajton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

***Supre estas foto de Dorota Burchardt (Pollando)  
(Laŭda mencio en la deka fotokonkurso)***